

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

8

1975





Nova kuracistino de fiŝhaveno (*olepentraĵo*)

de Ĉen Janning



# Novaj riĉaj rikoltoj de ekonomiaj plantoj kaj senĉesa disvolviĝo de multflankaj entreprenoj

Ekde 1962 Ĉinio akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn en agrikulturo. Novaj abundaj rikoltoj estas akiritaj ankaŭ en produktado de kotono, oledonaj plantoj, jutoj kaj aliaj ekonomiaj plantoj krom en tiu de greno kaj niaj forstumado, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝado ricevis novan disvolviĝon.

Laboristoj de laminaria kultivejo de Lianjungang, Giansu-provinco, en rikoltado







Unu el la kotonace-  
tejoj de Hinje-gubernio,  
Henan-provinco

Komunumanino de  
Vanjong, Sanhi-pro-  
vinco, revenas de  
kolektado de koton.




Komunumanoj de  
Tianjang-gubernio de  
la Guanghi-a Ĝuang-  
a Aŭtonoma Regio-  
no rikoltas sukerka-  
nojn.



Komunumanoj de Ĝuĉeng, Ŝandong-provinco, sunumas nove rikoltitajn arakidojn.



Membroj de Vusan-komunumo en antaŭurbo de Senjang liveras legomojn al la urbo.






Komunumanoj de Vengiang-gubernio,  
Siĉuan-provinco, rikoltas kanabojn.




Fengjang-gubernio de Anhuj-provinco, unu el la ĉinaj  
famaj produktoj de tabako, ricevis riĉan rikolton.






Sansaŝan-gubernio de la Hingiang  
a Ujgura Aŭtonoma Regiono  
produktejo de hami-melono, akir-  
is riĉan rikoltoŝton de tiu ŝata  
frukto.



Popola komunumo de Zuku-  
bernio, Kinghaj-provincio, tra  
portas sian lanon al aĉetejo.



Ĝegiang-provincio, unu el la ĉe-  
faj produktejoj de kokonoj, de-  
nove akiris riĉan rikoltoŝton de ko-  
konoj.





Laboristoj de la Ljuda-a Akvoprodukta Kompanio de Liaŭning-provinco kaptas salikokojn.



Heping-brigado de Baŭ-an-gubernio de Guangdong-provinco liveras grandan kvanton da ovoj al la ŝtato



# Li kondutas ankoraŭ kiel ordinara soldato

“Altigis lia ofico, sed ne ŝanĝigis lia proleta naturo. Li kondutas ankoraŭ kiel ordinara soldato.” Tiel la soldatoj de iu regimento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo laŭdas sian vicstabeŝtron Ĝong Ĝaŭju.

Ĝong Ĝaŭju, nun 50-jara, naskiĝis en familio de malriĉa kamparano de Giangsu-provinco kaj aliĝis al la revolucia vicaro en 1945. En la Liberiga Milito kaj la Kontraŭusona Milito por Helpi Koreion li multfoje faris meritojn kaj estis honorita per la titolo de batala heroo. En la batalo por defendi kaj konstrui la grandan socialisman patrion, firme memorante la instruon de Prezidanto Maŭ “**La profesioj de homoj estas malsamaj, sed ĉiu ajn, kiel ajn altan rangon li okupas, devas rilati al la popolo kun sinteno de ordinara laborulo**”, li ne ĉesas privilegion nek personan profiton, sed vivas solidare kun la soldatoj, kaj lia bona konduto estis plurfoje laŭdita de la supera partia komitato per cirkuleroj.

## ROMPI BURGĴAJN MOROJN

En la fino de 1971 al la regimento estis asignita tasko de nacidefenda konstruo. La partia komitato de la regimento decidis establi komandejon por la konstruado. Ĝong Ĝaŭju iniciate petis labori en la komandejo. Sed tie la laboro estos peza kaj cetere kamarado Ĝong Ĝaŭju estas malforta, tial la partia komitato admonis ke li nuligu sian peton. Ĝong Ĝaŭju

diris: “Ĉiuj estas pene klopodantaj por la socialisma konstruado kaj mi devas labori kune kun la kamaradoj.” Fine la partia komitato konsentis lian peton kaj nomumis lin estro de la komandejo.

Li venis al la konstruejo. Demetinte sian tornistran li tuj iris labori. Reveninte vespere li dormis kune kun aliaj kamaradoj sur sama granda terlito. Laborantoj de la komandejo intencis aranĝi por li apartan ĉambron, sed li rifuzis dirante: “Kunvivado de oficioj kaj soldatoj estas unu el niaj revoluciaj tradicioj. Post la venko de la revolucio, ni tamen ne devas flankenmeti la bonan tradicion.” Kaj li daŭre dormis kune kun aliaj kamaradoj sur la sama terlito.

Ĝong Ĝaŭju ofte movas la laborantojn de la komandejo lerni koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ kaj kritiki reakciajn diraĵojn de Lin Biaŭ, kaj edukas ilin, ke ili ne postulu privilegion fariĝinte kadroj. Li ofte diris: “Pretendi vivon pli komfortan ol tiu de la amasoj fariĝinte kadroj estas malnova moro de ekspluata klaso. Ni devas klopori la unuajn por likvidi tion.” Li estas rigora al siaj subuloj kaj multe pli al si mem. Li ofte iris labori kune kun kamaradoj sur la konstruejo. Konsiderante lian aĝon kaj malfortecon oni intencis fari al li pli bonan manĝon, sed li neniel konsentis kaj ĉiam prenas pladon saman al tiu de la soldatoj.

Ĝong Ĝaŭju havas kerosenan kuirfornon. En iu tempo li ne aĉetis kerosenon kaj ne uzis la fornon. Sciinte tion soldatoj portis al lia domo iom da uzita mazuto, kiam Ĝong Ĝaŭju ne estis hejme. Kiam li revenis post laboro, lia edzino jam estis kuiranta per la forno. Sciiginte pri la deveno de la mazuto, li tuj estingis la fajron. Elverŝante la mazuton li klarigis al sia edzino: “Ĝui privilegion utiligante sian postenon estas burokrata stilo de ekspluata klaso. Ni neniel devas infektiĝi de tio.” Li redonis la mazuton al la komandejo kaj okazigis partifilian kunvenon, en kiu li faris memkritikon kaj starigis regulon, ke ĉiuj, ĉu oficiroj aŭ soldatoj, ne devas uzi guton da mazuto pro privata bezono.

## ŜVITEGI SAME KIEL SOLDATOJ

Prezidanto Maŭ diris: **“Partoprenante kolektivitan produktan laboron, la kadroj tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligon kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por la socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon.”** Firme memorante tiun instruon Ĝong Ĝaŭju neniam disiĝis de fizika laboro kaj la amasoj. Li ofte diras: “Sen kuna laboro kun soldatoj la kadroj ne povas scii pri ilia laciĝo. Oni povas intimiĝi kun la soldatoj nur en kuna laborado kun ili.”

Koncerna fako difinis, ke por tunelado de ĉiu metro estas permesate konsumi 1 borstangon kaj 2 borilojn. Sed en iu tempo artileria kompanio eluzis 2 borstangojn kaj 4 borilojn. Provizisto de instrumentoj plende raportis tion al Ĝong Ĝaŭju. Poste li tuj venis al la konstruejo kaj komencis bori per pneŭmatika borilo kune kun soldatoj. En laborado li rimarkis, ke la ŝtono de tiu parto en la tunelo estas tre malmola kaj la permesata sumo de instrumentoj ne sufiĉas. Li raportis tion

al la supera instanco petante aldonon de instrumentoj kaj varme laŭdis la fosantojn, kiuj timis nek penegon nek malfacilon. La tuta kompanio estis kuraĝigita kaj eklaboris kun pli granda entuziasmo. Ankaŭ la laborantoj de la komandejo estis edifitaj de lia faro. Ili profunde komprenis, ke tiu kiu disiĝas de laboro kaj de la amasoj ne havas la rajton gvidi. Ili prenas Ĝong Ĝaŭju kiel ekzemplon kaj persistas en kuna laborado kun soldatoj. Ili rigardas la problemojn de kompanioj kaj la malfacilojn de soldatoj kiel siajn proprajn. Ili klare scias, kiu bezonas kion, kaj povas ĝustatempe liveri la bezonaĵojn.

Ĝong Ĝaŭju ofte edukas siajn infanojn, ke ili aktive partoprenu en fizika laboro. Li aĉetis por siaj 3 lernantaj filinoj korbetojn kaj agrikulturilojn por ke ili kolektu fekaĵonsterkon por la produkta taĉmento proksime de la kazerno. En feriaj tagoj de la lernejo li instigis sian edzinon kaj la infanojn labori por la produkta taĉmento. Komence la infanoj ne komprenis lin pensante, ke ili ne estas komunumanoj kaj tute ne gravas tion fari aŭ ne. Ĝong Ĝaŭju rakontis al ili sian tragikan travivaĵon en la malnova socio. Tiam lia familio ne havis kampon kaj liaj avo kaj patro nur povis dungigi sin al bienuloj. Li edukis la infanojn: “Laboremo estas la naturo de la laboranta popolo. Se vi ne volas labori opiniante ke via patro estas kadro, tio signifas forgeson de la amara pasinteco.” Dank’ al lia edukado liaj infanoj prenis laboradon kiel unu el la gravaj lernobjektoj. La tri fratinoj ĉiujare laboris pli ol 100 tagojn kaj kolektis pli ol 500 kg. da fekaĵo-sterko por la produkta taĉmento. Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj ĝoje diris: “Maljuna Ĝong okupiĝis pri la revolucio jam pli ol 30 jarojn sed ankoraŭ tenas la naturon de kampanoj kaj dank’ al lia edukado liaj infanoj fariĝis bonaj idoj de ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.”



## DAŬRIGI LA TRADICION DE UNUECO INTER OFICIROJ KAJ SOLDATOJ

Ĝong Ĝaŭju neniam forgesos la jenan travivaĵon: En 1946, malpli ol unu jaron post lia armeaniĝo, li malsaniĝis je tifo kaj svenis de tempo al tempo. Malgraŭ la streĉa batalado, liaj kunbatalantoj portis lin per branĉkardo de pozicio al pozicio en pli ol 20 sinsekvaj tagoj. Li neniam forgesos ankaŭ tion: En 1947 lia trupo batalis en norda Giangsu-provinco. Li eluzis siajn ŝuojn kaj lia plotonestro donacis al li paron da novaj ŝuoj, sed tiu mem militiris nudpiede. De tiam la glora tradicio de unueco inter oficiroj kaj soldatoj profunde radikiĝis en lia koro. Li ofte diris: “Ni estas popola armeo gvidata de Prezidanto Maŭ kaj inter la oficiroj kaj soldatoj ekzistas rilatoj de samklasanoj. La oficiroj amas la soldatojn kaj la lastaj prizorgas siajn gvidantojn, tio estas la glora tradicio de la popola armeo. Ni devas heredi kaj daŭrigi la tradicion.”

Soldato Kian Ajmin venis de kompanio al la komandejo por servi kiel kuiristo. Li rigardis la laboron neglora kaj ĝin plenumis nevolonte. Ĝong Ĝaŭju ekmaltrankviliĝis rimarkinte lian eraran penson. Spite al doloro je la talio kaj gamboj pro fizika laboro li multfoje faris koran interparolon kun malgranda Kian nokte, helpis lin en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj en kritiko kontraŭ la reakciaj pensoj de Lin Biaŭ kaj Konfucio malestimi la laborantan popolon. Dank’ al tio, malgranda Kian korektis sian eraran penson kaj ekamis la laboron de kuiristo.

Por provi metodon de rapida forigado de fumo el tunelo, Ĝong Ĝaŭju surmetis gasmaskon kaj iris en fumplenan tunelon profundan je pli ol 40 metroj. Soldatoj volis anstataŭi lin en la provado, sed li neniel konsentis. Li diris: “La gaso estas venena, prefere mi daŭrigu la provadon.” Iun aŭgustan nokton

de la pasinta jaro, pluvego estigis torenton kaj la akvo tiel inundis la konstruejon, ke oni ne povis trovi vojon. Rigardante la sablozan torenton en ekbrilo de fulmo, Ĝong Ĝaŭju maltrankviliĝis pro la soldatoj laborantaj sur la monto. Malgraŭ la forta vento kaj la intensa pluvo li stumble iris al la monto vadante en la ĝisgenua akvo. En la profunda nokto li trairis ĉiujn laborlokojn de la konstruejo de unu al alia por kontroli ĉu tie okazos io danĝera, ĉu likas la ŝirmejoj de soldatoj. En lumo de fulmo plotonestro Van Fanggju kaj soldatoj vidis la malfortan Ĝong Ĝaŭju tramalsekigita kun kruroj kotoplenaj. Ili estis kortuŝitaj ĝis larmoj kaj tiris lin en la tunelon por ke li sin ŝirmu kontraŭ la pluvego. Sed Ĝong Ĝaŭju dankeme rifuzis kaj foriris al alia loko por daŭrigi la kontroladon. Rigardante lian dorson malaperantan en la nokta pluvo, la soldatoj diris emocie: “Vicstabestro Ĝong ĉiam tenas nin soldatojn en la koro, sed neniam zorgas pri si mem.”

Ĝong Ĝaŭju amas la soldatojn kaj la soldatoj amas lin. Instruo de Prezidanto Maŭ kaj profunda klasa amo streĉe kunligis lin kaj la soldatojn.

Kun plena klasa malamo Ĝong Ĝaŭju defiis la hierarkion de ekspluata klaso. Li profunde komprenis, ke konscienca limigo de burĝaj rajtoj, ĝusta traktado de rilatoj inter superuloj kaj subuloj kaj inter oficiroj kaj soldatoj kaj konservo de la naturo de ordinara soldato havas gravan signifon por la firmigo de la diktaturo de la proletaro. Li starigis por si rigorajn normojn: Ĉiam esti singardema kontraŭ korodo de burĝa vivstilo, konservi kaj disvolvi la revolucionan tradicion de penemalukto, neniam halti sur la revolucia vojo, sentigi al ĉiu soldato la varmon de la Partio, stimuli la batalvolon de la oficiroj kaj soldatoj, kaj multe kontribui al firmigo de la diktaturo de la proletaro kaj la defendo kaj konstruo de la granda socialisma patrio.

# ĈPLA-anoj amas la popolon

Ilustrita de ĈEN JUHIAN

## POPOLAMA VEKTO

La kompanio ordonita de la Provinca Milita Distrikto de Henan por gardi la fervojan pontegon Jangliandi sur la linio Lanĝoŭ-Lianjungang havas vekton uzitan jam 23 jarojn. De 23 jaroj, la komandantoj kaj batalantoj de la kompanio, kiuj sinsekve ricevis la nomitan taskon, portadis puran akvon per tiu vekto por la emerita veterana fervojisto Ma Liang-ju, kaj la lokanoj ĝin nomis “popolama vekto”.

En printempo de 1951, la komandantoj kaj la batalantoj de la kompanio venis al la pontego por plenumi la taskon de gardado. Por disvolvi la tradicion de ĈPLA subteni la registaron kaj ami la popolon, ili vizitis ĉiujn najbarajn loĝantojn unu familion post alia. Ili trovis ke la geedzoj de la emerita laboristo Ma Liang-ju havas malfacilojn en akiro de trinkakvo pro la longa distanco inter sia loĝejo kaj la vilaĝo. Tiam la kompanio unuanime decidis preni sur sin la taskon havigi akvon al la gemaljunuloj.

Dank’ al la helpo de la ĈPLA-anoj la akvo-vazego de onklo Ma estis ĉiam plena de akvo. En granda sekeco, kiam la putoj sekigis, la batalantoj iris 2-3 km. foren por alporti puran akvon. En malvarmega vintro, ili akurate plenumis la taskon tiel en ventego kiel en

neĝado. Iufoje, neĝado daŭris plurajn tagnoktojn, kaj la montregiono estis fermita de neĝo kaj glacio. La soldatoj diris: “Ni nepre garantiu la provizadon de akvo al la onklo.” La soldatoj ĉerpis akvon el sub glacio en valo unu lion sube kaj unu vektoportis la sitelojn supren, paŝante malfacile kun helpo de alia, kiu hakis la glacian vojeton per pioĉo kaj surŝutis ĝin per karbocindro. Ili tiel penadis plurfoje ĝis la akvujo estis plenigita. Onklo Ma kaj lia edzino emocie diris: “En nia vazego estas ne akvo, sed la koro de niaj sangaj parencoj de ĈPLA!”

Tio okazis jam antaŭ 23 jaroj, post kiam la gardokompanioj jam ŝanĝigis unu post alia. Tamen la vekto kaj kune kun ĝi la tasko de akvoportado por onklo Ma estis heredita de unu al alia kontinue sen interrompo.

En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, al la “popolama vekto” aldonigis multaj novaj enhavoj. Por helpi geonklojn Ma en kritikado kontraŭ la reacia programo “sinregi por restarigi la etiketon”, per kiu Lin Biaŭ vane celis imiti Konfucion, la batalantoj voĉlegis por la du maljunuloj novaĵojn el ĵurnaloj kaj invitis ilin al spektado de filmoj pri kritikado kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. En iu kritika kunveno, onklo Ma parolis pri mizeroj suferitaj en la malnova socio kaj kun senlima emocio montris la “popol-



aman vekton”, dirante: “La nova kaj malnova socioj estas du malsamaj mondoj, la du specoj de armeo prezentas du malsamajn sociojn.”

## REVIDO DE LUMO

La okuloj de onklino Vu Jujing, elmigrinto el Tajŝan-gubernio de Guangdong-provinco, jam blindis 8 jarojn. En fremdaj landoj ŝi vizitis multajn grandajn hospitalojn kaj pagis multan monon por peti kuracan helpon, tamen neniam aperis antaŭ ŝiaj okuloj la sopirata lumo.

En iu tago, iu amiko, kiu revenis post vizitado al la patrolando, vizitis ŝin kaj raportis al ŝi la gigantajn ŝanĝigojn de la patrolando post la Liberiĝo, kaj aparte la atingojn en kuraca kaj higiena aferoj. Aŭdinte ĉion rakontitan la onklino ekpensis: Kiel feliĉa estas la popolo de la patrolando sub la gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ. Ĉu ne estus eble ke ankaŭ mi dividu la feliĉon per reakiro de vidkapablo kaj vidu propraokule la novan fizionomion de la granda socialisma patrolando, se mi nun estus en la patrolando.

Tiu tago tamen venis fine. Onklino Vu entreprenis longan vojaĝon transoceanan kaj revenis al sia naskiĝloko, kiun ŝi forlasis antaŭ 32 jaroj.

Pri tio tuj informiĝis iu higiena grupo de la Kantonaj Trupoj de ĈPLA. La kamaradoj de la grupo pensis ke ili devas fari ĉion por rehavigi vidkapablon al onklino Vu, kiu estas ilia sanga parenco, por porti la zorgemon de



la Partio kaj Prezidanto Maŭ al la elmigrintaj samlandanoj en ŝian koron.

En la sekvanta tago, kiam kuracisto venis al onklino Vu, ties nevo ĝoje diris al sia onklino: “Ho onklino! venas liberigaj armeanoj por kuraci viajn okulojn!” Tio ŝin tiel surprizis kiel ĝojigis, ke ŝi emocie diris: “Tio estas tute ne eble eĉ en sonĝo por kapitalismaj landoj, ke anstataŭ vizito de paciento al kuracisto, kuracistoj venas mem iniciate al paciento!”

La blindiĝo de onklino Vu okazis antaŭ 8 jaroj, tiam onklino Vu laboris en iu fabriko

de ladmanĝaĵoj en fremda lando. Iutage, ŝia kunlaboranto vidis ke ŝi estas tre malsata, kaj donis al ŝi pecon da bakita kuko. Hazarde tion vidis la laborestro, kiu opiniis ke ŝi ŝtele manĝis ladmanĝaĵon kaj tuj vipis ŝin rekte sur la vizaĝon. La vipo trafis ŝiajn okulojn kaŭzante tre grandan doloron kaj de tiam ŝi ne plu povis vidi kaj estis elpelita el la fabriko.

Post ripetada ekzamenado, la kuracistoj de ĈPLA faris por ŝi operacion kaj necesajn injektojn kaj flegadon kun serioza zorgemo. En la 8-a tago post la operacio, kiam la kuracistoj atenteme malvolvis la bandaĝon por depreni la kompreson, lumon revidis onklino Vu. Kun profunda emocio ŝi rigardis la brillan portreton de Prezidanto Maŭ sur la muro kaj kun larmoj foje kaj refoje kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!”

## NENIA ESCEPTO

Antaŭ ne longe, iu trupo garnizonanta en Nankino faris kampan trejnadon kaj venis al la vilaĝo Hepu de Gi-an, Gianghi-provinco.

Post aranĝado de kampadejo, subplotonestro Ĝeng Kanghuo kaj ĉevalisto Ĉen Ĝaŭping iris en pluvo sur la monton por falĉi herbojn. Transirinte plurajn montojn, ili fine trovis iun deklivon plenan de prosperaj herboj. Kiam ili volis komenci falĉadon, ili vidis du tabulojn unu malnovan kaj alian novan. Sur la unua, estis skribaĵo: “La monto estas fermata al ĉiuj pro kreskigo de arbaro”, sur la dua: “Escepto nur al trejnataj trupoj”.

“K-do subplotonestro, kiel zorgemaj estas la amasoj al ni soldatoj de la popolo! Ili eĉ atentis rezervi escepton por ni!” Ĝoje diris malgranda Ĉen montrante la novan tabulon.

“Jes, la amasoj nin tre zorgas kaj ĉiam pensas pri ni,” diris Ĝeng Kanghuo kaj subite ekdemandis: “Sed, kion ni faru pri la escepto, malgranda Ĉen?”

“Kion fari?” Montrante la novan tabulon malgranda Ĉen respondis: “En esceptaj okazoj restas la ‘escepto’, cetere falas pluvo!”

Subplotonestro Ĝeng diris: “Malgranda Ĉen, ni estas filoj de la popolo, ju pli la amasoj nin prizorgas, des pli ni devas protekti la interesojn de la amasoj. Se trejnado estas escepta okazo, kaj ankaŭ la pluvo, tamen, la ‘Tri ĉefaj reguloj de disciplino kaj ok punktoj de atentigo’, persone ellaboritaj de Prezidanto Maŭ por ni, ne konas escepton. Malgranda Ĉen, ĉu vi ankoraŭ memoras la rakonton pri la Ruĝa Armeo, kiu observis disciplinon kaj amis la popolon, faritan de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj hieraŭ por ni?”

La kortuŝa sceno de observado de la Ruĝa Armeo al disciplino kaj ĝia amo al la popolo okazinta siatempe en Hepu refoje aperis antaŭ la okuloj de la du batalantoj. En vintro de 1930, ĝuste kiam la 100,000 ruĝaj armeanoj marŝis al Gi-an, iutage iu trupo de la Ruĝa Armeo venis al Hepu. Tuj demetinte la tornistran, la soldatoj komencis vektoporiri akvon kaj purigi kortojn por la amasoj, tamen, en la nokto, por ne malhelpi la ripozon de la amasoj, ili neniel volis tranokti en domoj de la popolo kaj kuŝis eksterdome sub tegmentrandoj aŭ ĉe muro, malgraŭ ĉia persvado . . .

Tiu glora tradicio de la ruĝaj armeanoj profunde edukis malgrandan Ĉen. Li emocie diris: “Mi komprenis, k-do subplotonestro. Iru! Ni serĉu herbojn aliloke!” Kaj ili ekiris de la deklivo plena de prosperaj herboj, kantante la kanton *Tri Ĉefaj Reguloj de Disciplino kaj Ok Punktoj de Atentigo*.

## NE LA VENTO NEK LA PLUVO ESTAS MALHELPO

Ekpluvegis kiam falis vespera kurteno.

Tiu estis tago por lernado de la teoria grupo de Kjunli-brigado. La komunumanoj jam kolektiĝis por studi la verkon de Prezidanto Maŭ “Pri la Militaj Principoj en la Kampanjo de Liaŭning-Ŝenĵang” kaj kritiki la burĝan





militan linion de Lin Biaŭ. Aŭskultante la intensan bruadon de la pluvo ekster la domo, ili ekkonversaciis. Iuj diris: “La pluvo ne povos ĉesi baldaŭ, la monto estas kruta kaj vojeto glitiga. Verŝajne ne venos al ni hodiaŭ la kamaradoj de la trupo.” Sed aliaj opiniis: “Ekde la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la armeaj kamaradoj helpis nin fondi teorian grupon kaj partoprenis en nia studado regule en ĉiuj lernotagoj. Ili certe venos ankaŭ hodiaŭ!” Maljuna malriĉkampano Liu Hoŭguj diris: “En la lastaj tagoj, la armeaj kamaradoj estas tre lacaj pro trejnado sur la kampo. Nun pluvas, kaj estas ŝanco por ke ili bone ripozu hodiaŭ!”

Sed, la pordo subite estis malfermita. Oni vidis ke la armeaj kamaradoj tamen venas. La aktivuloj de la teoria studgrupo tuj ĉirkaŭis ilin por helpi ilin demeti la pluvmantelojn kaj alporti trinkakvon, ne sciante kion diri pro emociiĝo.

Kiam ĉiuj jam sidiĝis, la politika direktanto Tian Ŝujong ekdiris kun bedaŭro: “Ni malfruas!” Onklo Liu Hoŭguj malkonsentis: “Ne tion diru! La pluvo ja estas tiel granda, sed

por vi ne la vento nek la pluvo estas malhelpo!” La politika vicdirektanto Hu Ŝunjin diris kun rideto: “Tutkora kaj tutanima servado al la popolo estas nia sola celo, la lernado de revolucia teorio kaj kritikado kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kune kun la malriĉkampanoj kaj la malsuperaj mezkampanoj estas bona ŝanco por ni en lernado de la tutlanda popolo!” La politika direktanto daŭrigis: “Prezidanto Maŭ diris ke la Ruĝa Armeo ne batalas sole por batalo. Forlasi la celojn de propagando, organizado, armado inter la amasoj kaj konstruado de revolucia potenco signifas perdon de la signifo de ekzisto de nia armeo. Lin Biaŭ subfosis la efektivigon de tiu instrukcio de Prezidanto Maŭ en la armeo kaj vane intencis turni nian armeon en lian instrumenton por restaŭri kapitalismon. Nia alveno estas kritiko de la burĝa milita linio de Lin Biaŭ per konkreta ago.” Onklo Liu laŭde kapjesadis, aŭskultinte tion.

Ekster la domo, hurlis la vento envolvante la pluvon. En la domo, onklo Liu pliheligis la lampon. La politikaj direktanto kaj vicdirektanto elprenis militajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ili ĉiuj komencis la studon.

## *Kuna defendo de landlimo*

*En verda uniformo kun la ruĝa stel' sur kepo  
jen trup' da limdefendaj gvardianoj  
viciĝas kun militaj sabroj en la manoj.  
Kaj la ĉevaloj svingas la kolharojn sur la stepo.*

*Kaj tie stepaj milicanoj rajdas en linio  
en verda robo kun skarлата zono ĉe l' talio.  
Sur ŝultr' ilia kvinfuta fusilo firme pendas,  
kaj al ĉiel' henante, la ĉevaloj koletendas.*

*Ho! kiom brilas bele l' flago de milito!  
Kaj tiom la batalvicar' imponas al la vido!*

*Jen sonas la signal' por start' al fronto;  
ekflugas sur la kampo jen du drakoj:  
kiel procelario unu flugas super ondoj;  
l' alia kiel sago elsendita de forta pafarko.*

*L' unua trup' per sabrosving' sternigas pajlajn homfigurojn  
kun ritmaj ŝe-ŝe-ŝe-susuroj.*

*L' alia levas la fusilojn kontraŭ forfuĝantajn malamikojn,  
atingas ĉiuj kugloj sian celon kun efiko.*



*Ho, bela scen' de kuna limdefendo far l' armeo kaj popolo!  
Ho, brave! kanto de triumf' de batalfort-kunigo!*

*Triumfe revenante post manovr' intensa, sian senton  
entuziasman elkantadas la taĉmentoj.*

*Ĉiflanke: "Estas ni de patroland' lim-gvardianoj";  
kaj aliflanke: "Ni deziras esti por la lando indaj milicanoj".*

*Ho, tia la popol' kaj tiaj la soldatoj  
kun ruĝa kor', malmolaj ostoj kaj lertec' en militado.  
Feran Grandmuron formas man' en mano,  
ĉe la landlimo la popol' kaj armeanoj.*



# Ĉangĝoŭ-a industrio en rapida disvolviĝo

Ĉangĝoŭ kun 260,000 loĝantoj estas urbo de Ĝiangsu-provinco oriente de Ĉinio kaj ankaŭ antikva urbo kun longa historio.

En Ĉinio, je mencio pri Ĉangĝoŭ en la pasinteco, oni tuj ekpensis pri ĝiaj kombiloj el bambuo kaj ligno. Tiam Ĉangĝoŭ havis ne niun industrion escepte de tiu tradicia metio. En la unuaj jaroj post la Liberiĝo, tie troviĝis nur unu aŭtoriparejo, kelkaj malgrandaj tekstilejoj kaj prilaborejoj de greno kaj oledona materialo. Sed post konstruado de pli ol 20 jaroj, la nuna Ĉangĝoŭ jam fariĝis industria urbo, kiu estas unu el mezaj kaj malgrandaj urboj troviĝantaj diversloke de nia lando en disvolvado de socialisma industrio surbaze de sendependeco, memdecido, sinapogo sur propraj fortoj kaj lerno de Daking en industrio.

## DE LIGNA KOMBILO ĜIS ELEKTRONIKA KOMPUTERO

Irante sur la strato, kie antaŭe troviĝis butikoj ĉefe vendantaj lignajn kombilojn, la vizitantoj, kiuj konis la malnovan Ĉangĝoŭ, ekhavis fortan impreson: Jam tute ŝanĝiĝis la urbo. Nun, ambaŭflanke de tiu strato troviĝas nombro da fabrikoj de elektronikaj elementoj kaj aparatoj. Tiuj fabrikoj starigitaj en la jaro 1958 rapide disvolviĝis en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj plenigis vakanteojn de multaj elektronikaj produktaĵoj de nia lando, kaj iliaj produktokvantoj kaj specoj kreskis respektive je pli-ol-30-oblo kompare kun tiuj antaŭ la kultura revolucio. En la

lastaj jaroj, la laboristoj aplikis la elektronikon en tekstilado, maŝinfarado, metalurgio, kemiindustrio, medicino, higieno k.a. kaj provfabrikis kaj produktis laseran geometrizilon, elektronikan desegnogravurilon, elektronikan komputeron k.a., kiuj ludas rolon en plialtigo de produkta aŭtomatigo kaj rapidigo de socialisma konstruado.

La orienta kaj okcidenta antaŭurboj de Ĉangĝoŭ antaŭe estis dezertaj montetoj kaj fragmitejoj, sed nun fariĝis novaj industriaj kvartaloj. La urbo nun havas modernajn industriojn de tekstilado, prestinkuro, mekaniko, kemio, elektroniko kaj karbo, kaj ĝi povas produkti duradajn marŝotraktorojn, dizelojn, senjuntajn ŝtaltubojn, neferajn metalojn, vitrofibre armaturitajn plastajojn, elektrajn lokomotivojn por fabrikoj kaj minejoj, baskulkamionojn, kombinajn ilmaŝinojn, kemiajn sterkojn, insekticidojn, plastajojn, radiatoricevilojn, laseraĵojn kaj tekstilaĵojn. Pli ol 500 specoj de industriaj produktaĵoj de Ĉangĝoŭ estas fabrikitaj laŭ la plano de la ŝtato, kiuj liveriĝas al Ĝiangsu kaj aliaj provincoj kaj eksportiĝas al kelkdek landoj.

Dank' al la rapida disvolviĝo, la industrio de Ĉangĝoŭ akumulis por la ŝtato ĉiam pli multan kapitalon. La totala produkta valoro de ĝia industrio kreskis de pli ol 8,000 juanoj en 1949 ĝis 1,900,000,000 juanoj en 1974. Ĝia akumulo dum la lastaj naŭ jaroj egalas 13-oblon de la tuta industria investo en la sama periodo.

## DISVOLVIĜO EN SUBTENO AL AGRIKULTURO


Kiel disvolviĝis la industrio de Ĉangĝoŭ?

La lokanoj figure respondas pri tio ke ĝi disvolviĝas kiel “neĝbulo ruliĝas antaŭen kun agrikulturo kiel la bulkerno”. Tio signifas, ke la industrio de Ĉangĝoŭ disvolviĝas laŭ la bezonoj de agrikulturo, sub la direktado de la ĝenerala principo por disvolvi nacian ekonomion “preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron”.

Ni unue prenu la malpezan industrion de Ĉangĝoŭ kiel ekzemplon. Ĝi ricevis rapidan disvolviĝon, prenante kotonon kaj aliajn agrikulturajn produktaĵojn de la proksima kamparo kiel siajn materialojn kaj la kamparon kiel vastan merkaton de siaj produktaĵoj. La ripa veluro kaj aliaj tekstilaĵoj produktitaj de la urbo havas ĉiam pli grandan debiton pro sia bonkvaliteco kaj varieco de koloroj kaj specoj, kaj ankaŭ eksportiĝis al iuj landoj kaj regionoj. La disvolviĝo de malpeza industrio servas al la peza industrio per kulturo de teknikaj fortoj kaj akumulo de kapitalo.

Por subteni agrikulturon, Ĉangĝoŭ disvolvis sian pezan industrion komencante per produktado de agrikulturaj duradaj maŝinotrajtoj kaj malgrandaj dizeloj. Je la komenco, iuj diris ke la produkta valoro kaj la profito de la poragrikulturaj produktaĵoj estas malgrandaj, kaj proponis ke oni produkti altvalorajn produktaĵojn. Por nura ĉaso de produktovalorado kaj profito, iliaj produktaĵoj estis malbonkvalitaj kaj ne taŭgis al la bezono de la merkato. Kaj aldone al tio, la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki ĝenis la entreprenadon de la fabriko, kaj oni ĉesis la produkton de dizeloj — la fabriko deviiis de la ĝusta direkto.

Ĝuste en la grava momento de la batalo inter la du klasoj, la du linioj kaj la du vojoj, Prezidanto Maŭ ellaboris la fundamentan linion de la Partio en la historia etapo de socialismo kaj la ĝeneralan principon por disvolvi la nacian ekonomion “kun agrikulturo kiel bazo, kun industrio kiel gvida faktoro”. La sunbrilo lumigis la antaŭenmarŝan vojon, kaj



*Grandkvanta produkto de transformatoroj bezonataj de la kamparo*

la laboristoj kaj oficistoj ĉiuj estis inspiritaj. Ili ripetade studis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ, kritikis reviziisman linion kaj reĝustigis la direkton de la fabriko. Dank’ al tio, ili rapide kaj sukcese provfabrikis dizelon kun malgranda povo. La Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio pluapasaŭ altigis la konsciencon de la vasta amaso de laboristoj kaj oficistoj en efektivigo de la fundamenta linio de la Partio. Ili persistis en la direkto de industria produkto por subteni agrikulturon, tiel ke la industrio subtenanta agrikulturon ricevis rapidan disvolviĝon.

La Ĉangĝoŭ-a Dizela Fabriko, kiu produktis 33,000 12-ĉevalpovajn dizelojn en la jaro 1974, antaŭe estis malgranda fera fabriko kaj



povis produkti nur olepremilon kaj aliajn simplajn feraĵojn. Por produkti dizelon, la laboristoj faris pli ol 2,000 teknikajn renovigojn, mem fabrikis pli ol 270 specialajn ekipaĵojn kaj starigis 15 mekanikajn kaj aŭtomatajn produktajn liniojn. En la lastaj jaroj, la nomita fabriko 12-obligis sian produktokvanton post pliigo de malgranda investo kaj 300 laboristoj. Se oni farus teknikajn renovigojn ne disvolvante la spiriton sinapogi sur la propraj fortoj, ĝia produkto ne povus atingi la nunan nivelon, eĉ se laboristoj estus pli multaj kaj investo estus duobligita.


La produkto de traktoroj kaj dizeloj akcelis la disvolviĝon de fabrikoj de muldado, forĝado kaj farado de dentradoj, kiuj provizas ilin per necesaj akcesoraĵoj, kaj kreis kondiĉojn por pluapase disvolvi produktadon de aliaj maŝinoj.

La saman vojon iris ankaŭ la kemia industrio de Ĉangĝou en sia disvolvado. En 1958,

la jaro de la Granda Antaŭensalto, la unika malgranda kemia fabriko de Ĉangĝou jam komencis produkti insekticidojn por subteni agrikulturon. Tiam ĝiaj laboristoj produktis normajn produktaĵojn per simplaj ekipaĵoj. Per teknikaj renovigoj ili iom post iom modernigis siajn ekipaĵojn. Kaj dum produkto de insekticida pulvoro "666" ili produktis kaŭstikan sodon kaj kloratan acidon, kaj sulfatan acidon dum produkto de fosfora sterko. Per tiuj fundamentaj kemiaĵoj, la urbo starigis iom post iom industriojn de plasto, tinkturo, medikamento, sinteza fibro, vitrofibro armaturita plastajo k.a. kies produktaĵoj nombriĝas pli ol 100 specojn.

La rapidan disvolviĝon kaj progresadon de la industrio de Ĉangĝou en kvanto, kvalito, vario de la produktaĵoj kaj tekniko oni ŝuldas ankaŭ al tio, ke dum subtenado al la agrikulturo ĝi senĉese plibonigis sian produktadon laŭ la karakterizaĵoj de la kamparo sude de Jangzi-

*Produkti por la kamparo baskulremorkojn*





rivero de nia lando, nome malgrandaj estas la kampopecoj, mallarĝaj estas kampeĝoj k.a. Laboristoj de la Ĉangĝoŭ-a Traktora Fabriko iam stiris sian unuan nombron da duradaj marŝotraktoroj al la kamparo por fari provan plugadon kaj peti de kamparanoj opiniojn, kaj poste faris plurfojaĵajn plibonigojn. Nun la duradaj marŝotraktoroj produktitaj de ili estas malgrandaj, malpezaj, altefikaj, malaltkostaj kaj trovas laŭdojn de kamparanoj kaj havas ĉiam pli grandan debiton. Tiamaniere, ĝi ne nur subtenis agrikulturon, sed ankaŭ akcelis sian disvolviĝon. Nun, la produkta valoro de la peza industrio de Ĉangĝoŭ jam okupis duonon de la totala produkta valoro de ĝiaj industrioj. Oni diras, ke “la neĝbulo fariĝis pli kaj pli granda”.

### **SINAPOGO SUR LA PROPRAJ FORTOJ**

En disvolvo de sia industrio Ĉangĝoŭ dependas ĉefe de la akumulo interne de sia industrio sed ne de ŝtata investo. Inter ĝiaj pli ol 360 fabrikoj kaj minejoj, nur malpli ol 5 procentoj estas konstruitaj per ŝtata investo, kaj la ceteraj iom post iom disvolviĝis en pli-grandigo de reprodukto.

La Ĉangĝoŭ-a industrio renkontis multajn malfacilojn en sia disvolviĝo pro sia malforta bazo. Tio okazis ankaŭ en produktado de la duradaj marŝotraktoroj. La Ĉangĝoŭ-a Traktora Fabriko antaŭe estis kunigita el forĝejoj, kaldronoriparejoj kaj aliaj kelkaj metiejoj, kaj komence povis produkti nur malgrandan pum-pilon. Kiam la urbo planis utiligi kaj reformi tiujn malgrandajn fabrikojn por produkti traktorojn, iuj diris, ke “malgranda fabriko kun malnovaj ekipaĵoj ne povas fabriki traktoron, same kiel kun tablo kiel scenejo oni ne povas ludi grandan operon”, kaj proponis konstrui fabrikon kun “relative granda skalo”, t.e. grandan traktoran fabrikon kun kompletaj procedoj de produkto de akcesoraĵoj ĝis ĝenerala muntado. Pro tio ili petis de la ŝtato grandan investon de kelkdek milionoj da juanoj kaj kelkdek hektarojn da kampoj por konstrui “traktoran urbon”. Sed la ŝtato ne konsentis tiun projekton nekonforman al la realo. Poste ili iom reduktis la sumon de investo tamen ankoraŭ volis konstrui tian fabrikon, sed ankaŭ tiu plano ne estis aprobita.


Kion fari? La gvidantaro de la fabriko mobilizis la laboristojn al diskutado. La laboris-



toj proponis, ke sub la gvido de la Partio, oni utiligu kaj reformu malgrandajn fabrikojn kaj mem fabriku ekipaĵojn por disvolvi produkton. Ĉar ili komprenis, ke por plirapidigi la paŝojn de socialisma konstruado, la ŝtataj investoj kaj ekipaĵoj devas esti koncentre uzataj en gravaj konstruaj objektoj. La lokaj industrioj devas plene disvolvi sian iniciativon kaj kiel eble plej multe kontribui por la ŝtato per sia klopodo.

Dank' al utiligo kaj reformo de tiuj malgrandaj fabrikoj kaj per malmulta investo, en la jaro 1963 ili sukcese provfabrikis 12-ĉevalpovan duradan marŝotraktoron malpezan kaj facile manipuleblan, kiun plej bezonas la kamparo sude de Jangzi-rivero de Ĉinio. Kiam ĝi renkontis malfacilojn en grandkvanta produktado, la urba industria administracio organizis 22 fabrikojn en servo al ĝi por produkti maŝinpartojn, dank' al kio rapide grandiĝis ĝia produktokvanto. Nun la fabriko ĉiujare povas produkti 15,000 duradajn marŝotraktorojn.

Dum la elfosado de latentaj fortoj de entreprenoj kaj la teknika reformado, la gvidantoj kaj amasoj de Ĉangĝoŭ profunde konis la avantaĝon de organiziĝo de fabrikoj kaj minejoj. Kion unu fabriko ne povas fari, tion povas fari bone kaj rapide kelkaj fabrikoj kunlaborantaj. Ĝuste en kunlaboro de entreprenoj sam- kaj malsam-specaj, ili altigis sian kapablon de produktado sin apogante sur la propraj fortoj. Ni prenu la produkton de ripa veluro kiel ekzemplon. En la komenco de la sesdekaj jaroj, la ripa veluro produktita de Ĉangĝoŭ estis malmulta en kvanto kaj specoj kaj malbona en kvalito. Por disvolvi la produkton pli ol 100 produktaj ĉeneroj devas esti tuŝitaj kiel ŝpinado, teksado de bazŝtofo, lanugtranĉo kaj prestinkturo, kiujn ne kapablas fari unu ripvelura fabriko. La urba industria administracio organizis la koncernajn fabrikojn de ŝpinado, bazŝtofa teksado, lanugtranĉado kaj prestinkturado kaj mobilizis laboristojn kaj oficistojn al renovigo de teknologio kaj ekipaĵoj ĉirkaŭ strebado al altigo de produktokvanto kaj kvalito de ripa veluro. Post



*Laboristoj de la Cementa Fabriko de Ĉangĝoŭ muntas novan ekipaĵon.*

kelkjara klopodado, la nuna produktokvanto de ripa veluro kreskis per 4.5-oblo, la kvalito plialtiĝis kaj la specoj plimultiĝis.

Dum la pasintaj naŭ jaroj ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, la totala industria produktvaloro de Ĉangĝoŭ kreskis per pli-ol-tri-oblo, kies pli ol 90 procentoj venis de la malnovaj fabrikoj utiligitaj kaj reformitaj. Inter la fabrikoj de maŝinfarado, kemiaĵoj kaj prestinkturo, la dek fabrikoj kies produktitaj maŝinoj atingas dekmil, aŭ kies produktokvanto atingas dekmil tunojn aŭ kies produktvaloro superas 100,000,000 juanojn estas iom post iom disvolvitaĵoj dank' al utiligado kaj reformado de malnovaj entreprenoj. Ĉio ĉi tio plene montras la revolucian spiriton kaj kreivon de la Ĉangĝoŭ-a laboristaro.



# Novaj "Malsaĝaj Avoj" en Tajhang

— Noto pri vizito al la montregiono Tajhang

**E**N marto de la kuranta jaro, ni vizitis la montregionon Tajhang. Sur la vojo, ni ofte vidis "artajn riverojn" etendiĝantajn de monttalioj al nebula malproksimo, ŝtuparajn kampojn ornamantajn montetojn kaj grandajn pecojn da artaj ebenaĵoj sur antaŭaj ŝtonozaj bordetendaĵoj. Kaj lokanoj entuziasme rakontis al ni multajn kortuŝajn heroaĵojn de novaj "Malsaĝaj Avoj" en reformado de montoj kaj riveroj.

## I

La grandioza kaj kruta Tajhang-montaro etendiĝas de norde suden tra pli ol 60 gubernioj kaj urboj de la tri provincoj Ŝanhi, Hebej kaj Henan, kie de antikveco ofte okazis katastrofoj. Tie cirkulas inter amasoj jena fablo: En antikveco estis maljunulo nomata Malsaĝa Avo de la Norda Monto. Li decidis forigi, kun siaj familianoj la montojn Tajhang kaj Vangvu starantajn antaŭ lia domo. Alia maljunulo konata kiel Grandaĝulo Saĝa vidis ilin fosantaj kaj ridis, dirante, ke estas tute neeble por ili forigi montojn tiel grandajn. Malsaĝa Avo respondis: "Kiam mi mortos, la laboron daŭrigos miaj filoj; kiam ili mortos, tion faros miaj nepoj, kaj poste iliaj filoj kaj nepoj sekvos senfine. Kvankam la du montoj estas tre altaj, tamen ili ne povas kreski kaj, kun defoso de ĉiu peco, ili malkreskos. Kial do ni ne povos ilin ebenigi?" Refutinte la eraran opinion de Grandaĝulo Saĝa, li daŭrigis la fosadon ĉiutage. Tio fine kortuŝis Dion kaj li ordonis anĝelojn forporti la du montojn. La fablo spegulas la fortan deziron de la laboranta popolo por venki la naturon. Sed veraj Malsaĝaj Avoj povas aperi nur sub la

gvido de la Komunista Partio kaj ilia deziro povas realiĝi nur en la socialisma socio.

En la kampokonstruado per baro de rivero en Giaŭdonggoŭ de Hujhian-gubernio de Henan-provinco laboras kamarado Song Baŭlin kies familianoj ĉiuj estis elektitaj kiel labor-modeloj. En la malnova socio, li kaj liaj du fratoj sub la gvido de lia patro iam venis al ŝtonoza bordetendaĵo en Giaŭdonggoŭ konstrui kampon. Spite al frosta ventego kaj neĝado, ili laboris 4 vintrojn kaj 4 printempojn, kaj fine kreis tie tri parcelojn. Sed, kiam la plantoj kreskis ĝis la longeco de unu futo, ili estis tute forportitaj de inundo. Utiligante la ŝancon bienulo kaj centfamilia estro devigis ilin pagi imposton kaj repagi ŝuldon. Trovante neniun elirejon Song Baŭlin kaj lia familio devis forfuĝi kaj almozpeti, kaj 15 el la 19 familianoj mortis pro malsato kaj malsano.

Post la Liberiĝo, Song Baŭlin ne plu maltrankviliĝis pri vivo de la tuta familio. Sed ĉiufoje kiam li preteriris Giaŭdonggoŭ, li volis reformi la dezertan bordetendaĵon en fekundajn kampojn. La Hujhian-gubernia Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, nove fondita en la Granda Proleta Kultura Revolucio, decidis mobilizi la amasojn por reformi Giaŭdonggoŭ. Informiĝinte pri tio Song Baŭlin tre ĝojis kaj la unua sin anoncis por partopreni en la reformado. Sur la konstruejo de akvorezervejo li ĉiutage transportis ŝtonojn kun totala pezo de 16 tunoj per ĉarumo irante 30 kilometrojn kaj tie li laboris seninterrompe kvin jarojn. Nun sur ambaŭ bordoj de Giaŭdonggoŭ fariĝis ŝtuparaj kampoj kaj smeraldaj plantoj plene kovras la bordetendaĵon. Song

Baŭlin diris kun profunda kompreno: “En la lastaj jaroj mi pluapase komprenis la veron: Sen socialismo, ne povus esti mia hodiaŭo; sen la popola komunumo, ne eblus reformi la bordetendaĵon.”

Tion komprenas ja tre multaj krom Song Baŭlin. Tajhang-aj popolanoj varme amas socialismon kaj inter ili jam aperis miloj da novaj Malsaĝaj Avoj en reformado de montoj kaj riveroj. Dum la dek jaroj de konstruado de la fama Kanalo Ruĝa Flago en Linhian-gubernio de Henan-provinco aperis pli ol 3,000 labormodeloj, pli ol 1,000 lertaj eksplodigistoj kaj pli ol 60,000 ŝtonhakistoj. Sur ambaŭ bordoj de Ĝanghe-rivero oni fosis 14 malpli grandajn kanalojn, el kiuj ĉiu povas irigacii pli ol 1,000 hektarojn da agro. En ilia konstruado ankaŭ amase aperis heroaj personoj!

En la pasinteco la fablo de “Montotranslo- kigo fare de Malsaĝa Avo” esprimis la dezi- ron de la laboranta popolo, dum la heroaj fa- roj de la novaj Malsaĝaj Avoj portas tamen koloron de mito.


En Pingŝan-gubernio de Hebej-provinco tiuj, kiuj la unuaj boris tra monto tunelon kun longeco de 90 metroj en reformado de rivero estis kvin maljunaj komunumanoj kun meznombra aĝo de 62.5 jaroj.

14-jara Gaŭ Hiaŭbaŭ de Donghe-brigado ĉe la piedo de Vangvu-monto de Gijuan-gubernio, Henan-provinco, kaj liaj kelkaj bovpaŝtaj ami- kotoj kune konstruis irigacian kanalon kun longeco de pli ol 1,000 metroj dum bovpaŝtado por sia produkta taĉmento. Dank’ al tio du hektaroj da montdeklivaj kampoj ricevis iri- gaciadon.

La novaj Malsaĝaj Avoj de la montregiono Tajhang troviĝas en ambaŭ seksoj. La “Feraĵ Knabinoj” de la gubernioj Hijang kaj Linhian fariĝis vaste konataj, kaj ankaŭ la “Ŝtonaj Knabinoj” de la gubernio Hujhian estas nun konataj de la tuta lando. La tiea Ponto de la Ruĝa Virina Taĉmento estas konstruita ĉefe de 80 “Ŝtonaj Knabinoj”. La granda ŝtonponto je 95 metroj longa, je 20 metroj alta kaj kun spano de 65 metroj staras kvazaŭ ĉielarko super Hiangmu-rivero kaj ĝi simbolas la heroecon de la nuntempaj virinaj “Malsaĝaj Avoj” en la montregiono Tajhang.

## II

La montregiono Tajhang estas unu el la famaj revoluciaj bazoj de Ĉinio. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, tie sin trovis la ĉefkomandejo de la Okavoja Armeo. Sub la gvido de la Komunista Partio, tajhang-aj popolanoj disvolvis geriladon strikte kun- agante kun la Okavoja Armeo. Tio teruris la japanajn agresantojn. Nun ne nur rakontoj



Akvedukto sur Hu-  
toŭi-monto

pri la kortuŝaj herooj de frontosubtenaj modeloj kaj batalaj herooj ankoraŭ cirkulas inter amasoj, sed ankaŭ ilia revolucia sinoferemo estas pli kaj pli disvolvata. La vizitantoj al tiu regiono ĉiuj diris laŭde: “En la montregiono Tajhang multis herooj en la militaj jaroj, kaj en la nuna konstrua periodo multas novaj Malsaĝaj Avoj.”

Lang Venking, sekretario de la partia filio de Ŝujhi-brigado de Ginĉeng-gubernio, Ŝanhi-provinco, tri-f je glorie faris meritojn en la pasinta revolucia militado. Foje en iu batalo li estis vundita kaj perdis unu kruron. Post la malmobiliziĝo, li revenis al la hejmloko. La partia kaj registara organizaĵoj faris bonan aranĝon por lia vivo. Sed Lang Venking decidis ne sin apogi en vivo sur la ŝtato, sed persisti en partopreno en kolektiva produkta laboro. Komunumanoj ĉiuj diris kortuŝite: “Tiel diligente laboras maljuna Lang kun unu kruro, kiel pli energie devas labori ni homoj kun du kruroj!” Sub la gvido de Lang Venking kaj la partia filio, la brigado persistis dum la lastaj dek kelkaj jaroj en grundreformado kaj agrokreado, riverdragado kaj kanalkonstruado. Dank’ al tio, ĝia totala produktokvanto de greno en la jaro 1974 plimultiĝis per dekoblo kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo, kaj ankaŭ la vivnivelo de komunumanoj multe altiĝis.

Ŝujmen-brigado de Hingtaj-gubernio de Hebej-provinco estis fama modela vilaĝo en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. La granda kultura revolucio pluapasaŭ altigis la politikan konscion de la amasoj de la vilaĝo por daŭrigi la revolucion. Disvolvante la revolucion sindonemon en la militaj jaroj, ili levis tajdon de grandskala konstruado de kampoj. Sub la gvido de la partia filio, komunumanoj fosis tri-kvar metrojn profunde en ŝtonoza deklivo per ŝtalstangoj kaj fosiloj por elpreni ŝtonegojn, per kiuj ili masonis kamptaluson, sternis la ŝtonetojn kiel bazajon, sur kiuj ili ŝutis teron alportitan per vektoj kaj korboj de kelkajn kilometrojn fore. Tiamaniere ili penlaboradis sep jarojn kaj kreis 30 hektarojn da ebenaj ŝtuparaj kampoj sur la ŝtonoza monto-



*Gvidanto de la partia filio de Huluanling-brigado de Vuhiang-gubernio studas revolucion teorion kune kun la amasoj.*

deklivo. Nun, la 63 ŝtupoj da kampoj kuŝantaj unu sur alia etendas sin, kvazaŭ ŝtuparego, al la firmamento.

### III

La ŝanĝiĝo de la montregiono Tajhang donis tute novan impreson al homoj. Sur antaŭe dezertaj kaj kalvaj montoj nun kreskas prospere junaj arbaroj; tie kie antaŭe estis nur terpecoj tiel malgrandaj kiel manplato sur montodeklivoj nun aperis ebenaj ŝtuparkampoj; kaj la produktokvanto de greno de multaj lokoj tie jam atingis tiun de la regiono sude de Jangzi-rivero. Iuj gubernioj de la montregiono Tajhang en Hebej-provinco grenmankaj en la pasinteco nun povas ne nur kontentigi sian bezonon de greno, sed ankaŭ vendi grandan kvanton de superbezona greno al la ŝtato. La meznombra pohektara produktokvanto de greno de 10 el la 14 gubernioj kaj urboj laŭlonge de la montaro Tajhang en Henan-provinco superis 3,750 kilogramojn, kaj tiu de tri el ili eĉ superis 6,000 kilogramojn.

Sed pli kortuŝa estas la atakado de tiuj novaj Malsaĝaj Avoj al kapitalismaj pensoj, malnovaj kutimoj, moro kaj ideologio.



Daĝaj-brigado estas avangarda kolektivo de Malsaĝaj Avoj en la montregiono Tajhang, kiu ne nur kuraĝas formovi montojn sur la tero, sed ankaŭ malhelpajn ideologiajn “montojn” en la cerbo. La kaŭzo, ke miloj da komunumoj kaj brigadoj de la montregiono Tajhang povis akiri venkojn unu post alia en reformado de montoj kaj riveroj, kuŝas en tio, ke ili prenis Daĝaj-brigadon kiel ekzemplon kaj persistis en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro.

Nun en la konstruejoj de la montregiono Tajhang, komunumanoj tage demetinte vati-tajn vestojn peneme hakas monton kaj nokte en tendo aŭ politika vesper-lernejo ili serioze studas revoluciajn verkojn kaj faras revolucion kritikan. Vang Juming, maljuna malriĉkamarano de Huluanling-brigado de Vuhian-gubernio, Ŝanhi-provinco, diris prave: “Dum la reformado de montoj kaj riveroj, fakte, la ĉefa batalejo estas en nia cerbo. Se ni ne forigus la ‘monton’ en la penso, ni ne povus reformi la montojn sur la tero, kaj probable la renversitaj ‘tri grandaj montoj’ — imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo — denove kuŝiĝos sur nin, kaj ni anko-

raŭfoje suferos ekspluatadon kaj subpremadon!” La dirinto estis milicano en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, kaj nun estas estro de la kampokonstrua grupo de la brigado. Li tage gvidas amasojn en reformado de montoj kaj riveroj, nokte serioze studas Marksismon kaj Leninismon, kaj kelkiam lekcias por politika vesperlernejo de la brigado. En la lastaj jaroj, li legis *Manifeston de komunista partio, Ŝtaton kaj revolucion* kaj aliajn verkojn de Marks, Engels kaj Lenin, faris notojn dum legado kaj skribis historiojn de siaj vilaĝo kaj familio kaj de la batalo de milicanoj, sume kun cent kelkdek mil ideografiaĵoj. Komunumanoj intime nomis lin Viva Malsaĝa Avo, kiu diligente studas tage kaj nokte verkojn de Prezidanto Maŭ.

La Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio donis tute novan aspekton al la montregiono Tajhang. Teoriaj trupoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj sane kreskas en batalado. Sin apogante sur tiaj kamaranoj, la diktaturo de la proletaro en la kamparo de nia lando certe plifortiĝos senĉese kaj la socialisma konstrua afero certe donos pli riĉajn fruktojn.



*Gvidantoj kaj kamaranoj de Hujhian-gubernio kreas ŝtuparajn kampojn sur monto.*



# Sur la Siĉuan-Tibeta Ŝoseo

de HIAŬ BING

La fame konata Siĉuan-Tibeta Ŝoseo kunligas, kiel ora rubando, la internajn lokojn de Ĉinio kun la landlima regiono.

En la pasintaj 20 jaroj depost la malfermo de la ŝoseo al trafiko, ĝi ebligis senĉesan transportadon de granda kvanto da produktaj materialoj, diversaj mekanikaj ekipaĵoj kaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj al Tibeto kaj per tio forte subtenis la socialismajn revolucion kaj konstruadon de Tibeto kaj firmigis la defendon de la sudokcidenta landlimo de la patrolando. Kaj lano, feloj, diversaj drogoj kaj minaĵoj de Tibeto estis senĉese transportataj tra la ŝoseo al internaj regionoj, kaj per tio Tibeto faris kontribuon por prosperigo kaj disvolvo de la socialisma ekonomio de la patrolando.

## SENTINELOJ DE LA ŜOSEO

La regiono trapasata de la Siĉuan-Tibeta Ŝoseo havas komplikan topografion kaj ŝanĝiĝeman klimaton. La ŝoseo devas transpasi 14 grandajn montojn kiajn Erlang, Kjuer kaj Sekila je pli ol 3000-4000 metroj altajn super la marnivelo kaj la danĝerajn riverojn fame konatajn Lancang, Nugiang, Ginŝa k.a. Observante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ Zedong “**Ne timu malfacilojn kaj klopodu en konstruado de la ŝoseo por helpi fratajn naciminoritatojn**” kaj kun la heroeco “devigi altajn montojn sin klini kaj riverojn cedi vojon”, la ŝose-konstruantoj superis ŝtormon kaj froston, fendis krutajn rokmurojn kaj venkis diversajn naturajn barojn. . . En pli ol 4



jaroj, ili sukcesis etendi la Siĉuan-Tibetan Ŝoseon al Lasao — la centro de la “monda firsto” en decembro de 1954.

Ĉiu kiu veturis tra la ŝoseo venis al la sama konkludo: “Estas malfacile konstrui la ŝoseon, same ankaŭ ĝin protekti.”

Transpreninte la pretigitan ŝoseon la ŝoseprotektistoj firme decidis bone ĝin protekti per sia diligenta laboro. De jaro al jaro ili diurne patrolas laŭ la ŝoseo. Ili devas batali ne nur kontraŭ subfosado de la klasaj malamikoj sed ankaŭ kontraŭ naturaj katastrofoj kiaj glacirivero, neĝoŝtormo, terŝtona fluo kaj terfalo. La milionoj da liberigitaj kamparanoj kaj paŝtistoj laŭde nomas ilin sentineloj de la ŝoseo.

La Protekta Sekcio de la Sektoro Giangda de la ŝoseo, kiu estis elektita kiel avangarda sekcio en la pasintaj sinsekvaj ok jaroj ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, gajnis refoje la gloran titolon de “avangarda kolektivo” en la kuranta jaro. La ŝoseparto protektata de ĝi longas 223 km., transpasas kvar grandajn montojn kun meznombra alteco de pli ol 4,000 metroj super la marnivelo. Kvan-kam la kondiĉoj estas malbonaj kaj la tasko peza, tamen ĝi bone garantias trafikon de la ŝoseo, kaj pro tio ĝi ricevis laŭdojn de la trapasantaj ŝoforoj kaj vojaĝantoj. Kial ili povas ĉiujare teni la gloran titolon de avangardulo?

La radikala kialo estas jena: Responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **“lerni de Daking en industrio”** kaj prenante la laboristojn de Daking kiel ekzemplojn, la partia filio de la sekcio gvidas la laboristojn kaj oficistojn en serioza legado kaj studado de marksismaj-leninismaj verkoj. La gvidantoj ĉiam kaj ĉie donas bonan ekzemplon kaj la amasoj laboras energie. La sekretario de la partia filio Laj Ĝigjun kaj la vicsekretario Juan Ĝiping promociitaj el laboristoj ofte iris el sia oficejo por labori kune kun laboristoj kaj enketi pri la geografio, klimato kaj hidrologio en la sektoro. Dank’ al tio ili bone konis kie troviĝas danĝero de terfalo, kie povas okazi akva detruo, kiu ponto kaj kiu kulverto estas ofte ŝtopeblaj kaj kie oni devas teni

materialon por eventuala bezono. Ekzemple, iu parto de la sektoro kun longeco de pli ol 20 km. estas plena de eroziaj ŝtonoj, kiu en serena tago estas kovrata de dika tavolo da polvo kaj en pluva tago de ŝlimo, kio povas kaŭzi akcidenton de aŭtoglitigo. Pro tio, antaŭ la pluva sezono ili transportis gruzojn de loko je pli ol 10 km. fore, dispecigis kaj sternis ilin sur la ŝoseo, dank’ al kio multe reduktiĝis akcidentoj. Krom flegado de la ŝoseo, la laboristoj kaj oficistoj de la sekcio mem projektis kaj konstruis 11 ferbetonajn pontojn, per tio ili multe plibonigis la ŝoseon.

La tibetanoj-protektistoj de la ŝoseo rigardas la ŝoseprotektadon kiel sian gloran devon. La 76-a grupo de la Protekta Sekcio de la Sektoro Bajma ĉe la orienta piedo de la monto Angiula konsistas tute el tibetanoj. La parto protektata de ĝi troviĝas en loko pli ol 4,000 metrojn super la marnivelo, kie la klimato estas frosta kaj troviĝas multaj kulvertoj. En pluva tago la grupestro Luotianĝu ofte kontrolis la ŝoseon kunportante ŝovelilon. En la neĝabunda vintro li tuttage laboris kune kun siaj grupanoj sur la ŝoseo por forigi glacion kaj neĝon. La maljuna laboristo Juandeng havas jam preskaŭ 50 jarojn, kaj sur lia korpo restas cikatroj de vipado de servutul-mastro. Post partopreno en la laboro li metis sian tutan koron sur la ŝoseon. Li ofte diris: “Pensante ke la ŝoseprotektado estas por la revolucio, mi ĉiam havas neelĉerpeblan forton.” Foje li grave malsaniĝis kaj estis sendita al hospitalo por ricevi kuracadon. Tamen post 3 tagoj li ŝtele revenis al la grupo. Kiam oni demandis lin kial li ne volas esti tie pli da tagoj, li respondis: “Se nur mi vivas, mi devas bone protekti la ŝoseon por la revolucio.” Tiamaniere, la protektistoj kreskas en vento kaj pluvo peneme batalante sur neĝaj montoj kaj brile plenumis la gloran taskon al ili asignitan de la diversnaciaj popolanoj. Depost la jaro 1966, tiu grupo estis ĉiujare elektita kiel avangarda grupo.

### “HEJMO DE VOJAĜANTOJ”

Transgrimpinte la plej altan kaj plej krutan monton Kjueer kaj transpasinte la riveron



Ginŝa inter Siĉuan kaj Tibeto la ŝoforoj kaj vojaĝantoj veturantaj de Ĉengdu laŭ la ŝoseo atingas la transportan stacion Gangtuo. Apenaŭ vojaĝantoj eniras la stacion, ĝiaj servistoj tuj alpaŝas renkonte al ili. Ilia entuziasma servo varmigas la koron de la ŝoforoj kaj veturantoj. Sur la muroj de la stacio oni povas vidi multajn leterojn de vojaĝantoj por danki kaj laŭdi ilin pro ilia bona servo.

La bona servo de la stacio rezultigis de la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. En la pasinteco, pro la relative malbonaj kondiĉoj de tiu stacio iuj el la oficistoj kaj laboristoj ne volis labori en ĝi. En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la stacia partia filio gvidis la tutan personaron en serioza studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkoj de Prezidanto Maŭ kaj en forta kritiko kontraŭ diversaj reakciaj diraĵoj de Lin Biaŭ kaj Konfucio. Tio multe altigis la politikan konscion de la laboristoj kaj oficistoj. Maljuna laboristo Hie Huajjaŭ havas kvankam malaltan klercon, tamen profundan malamon kontraŭ la malnova socio. Kun nedetenebla indigno li verkis kritikan artikolon, en grandaj kaj malgrandaj kunvenoj li kritikis la krimojn de Lin Biaŭ en klopodo por restaŭri kapitalismon per rakonto pri siaj propraj suferoj en la malnova socio kaj varme prikantis la saĝan gvidon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. La korprenaj akuzoj de la maljuna laboristo donis al la laboristoj kaj oficistoj profundan edukon pri la batalo inter la du linioj kaj ŝanĝis ilian spiritan fizionomion kaj laborstilon. Ili decidis ŝanĝi la transportan stacion en "hejmon de ŝoforoj kaj vojaĝantoj".

"Tutkore servi al la vojaĝantoj", tiel pensas kaj ankaŭ tiel agas la laboristoj kaj oficistoj de la stacio Gangtuo. Ĉiufoje kiam alvenas multaj vojaĝantoj, ĉiuj ĉu laboristoj aŭ oficistoj memvole eliras por labori kiel servistoj, iuj vokas vojaĝantojn al vizaĝlavado aŭ tetrinkado, aliaj prezentas al ili menuon kaj triaj helpas kuiristojn en preparado de manĝaĵoj, por ke la vojaĝantoj ricevu bonan kaj rapidan servon kaj bongustan manĝaĵon. En ĉiuta-



*Ŝose-protektistoj forigas neĝon sur la ŝoseo por garantiĝi glatan trafikadon.*

ĝaj laboroj ili atenteme observas por koni la kutimojn kaj postulojn de vojaĝantoj en manĝado. La stacio situas sur monto je pli ol 3,000 metroj super la marnivelo, la laboristoj kaj oficistoj mem bredas porkojn kaj faras sojkazeon, ĉiutage ili preparas 5-6 specojn de manĝaĵoj, por ke la vojaĝantoj povu elekti laŭ sia gusto. Ilia servo multe kortuŝis la ŝoforojn kaj vojaĝantojn.

## HEROOJ SENDANĜERIGAJ

La parto de la ŝoseo inter la stepo Bangda kaj Linĝi kun longeco de pli ol 500 kilometroj estas plej serioze kaj plej ofte minacata de glacirivero, terfalo, inundo kaj terŝtona fluo. Disvolvante la gloran tradicion de siatempaj ŝose-konstruantoj peneme lukti en malfaciloj, la komandantoj kaj batalantoj de iu parto de la Konstrua Trupo de la Ĉina Popola Libera Armeo kuraĝe prenis sur sin la inĝenieran



*Tibetana ŝoforo  
Ĉangba (la meza)  
kaj liaj kolegoj*

taskon de tiu parto. En la lastaj jaroj ili atingis brilajn sukcesojn en altigo de la efiko de la ŝoseo per larĝigo de ĝia bazo, forigo de terfalaĵo kaj konstruo de pli multe da pontoj kaj kulvertoj.

En aŭgusto de 1974, falis pluvego en la gubernio Bahju malofte vidita en la pasintaj dekoj da jaroj. Post la pluvo furioza torento sturmis malsupren kunportante grandan kvanton da tero, sablo, ŝtonoj kaj putriĝintaj herboj, detruis la ŝosean bazon, interrompis la trafikon per falinta teraĵo kaj ŝtopis kaj detruis kulvertojn kaj pontojn, tiel ke multaj aŭtoj devis halti ĉe ambaŭ ekstretoj de la detruita parto.

La komandantoj kaj batalantoj de iu inĝeniera trupo, kiuj tiam laboris en proksima konstruejo, sin organizis en provizoran kontraŭinundan urĝsavan grupon, kaj tuj sin jetis en intensan batalon kune kun lokaj amasoj.

La ponteto Bajma estas ŝlosila trapasejo. La furioza torento kontinue sturmis ĝiajn abutmentojn. Por protekti la ponton oni devis redukti la puŝon de la torento kontraŭ la abutmentoj. Fronte al la ondanta akvego, la komandantoj kaj batalantoj, firme memorante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "Mi aprobas tiun sloganon, nome 'timu nek malfacilojn nek morton'", diris brave: "Ĉian ajn grandan malfacilon ni superos kaj ni nepre

obeigos la torenton!" Je ordono de la komandanto, ili saltis unuj post aliaj en la frostan akvegon kaj formis akvobarajn hommurojn por protekti la abutmentojn. Sub kunlaboro de popolanoj, ili rapide metis korbon post korbo da ŝtonoj en la akvon kaj fine sekurigis la ponteton.

Por frue refunkciigi la trafikon, oni devis ĝustatempe transporti dinamiton al la vilaĝo Licun trafita de serioza akvodetruo. Komunisto Feng Vangin, membro de la Komunisma Junulara Ligo Ĝoŭ Venlian kaj soldato Vang Tianhong saltis la unuaj en la torenton kaj malfacile vadis antaŭen. Dank' al la komuna klopodo de la tuta kompanio, oni fine starigis ŝnuron ponton super la rivero kaj ĝustatempe transportis la dinamiton al la konstruejo.

Dank' al 7-diurna klopodo de la komandantoj kaj batalantoj kaj la lokaj amasoj, la falintaj teraĵoj kaj ŝtonegoj estis forigitaj de sur la ŝoseo kaj baldaŭ rekomenciĝis la trafiko. Kun tia revolucia spirito la soldatoj de la konstrua trupo faris senŝanceliĝan batalon kontraŭ glacirivero, terfalo, torento, terŝtona fluo k.a., senĉese plifirmigis kaj plibonigis tiun plej danĝeran parton de la ŝoseo.


La Siĉuan-Tibeta Ŝoseo ludos ĉiam pli grandan rolon en la socialismaj revolucio kaj konstruado de Tibeto.

# Ĉinaj montgrimpistoj refoje konkeris Ĝomolangma-n


**L**A 27-an de majo, 1975, el la sudokcidenta limregiono de nia lando disflugis ĝojiga novaĵo, ke 1 virino kaj 8 viroj de la Ĉina Montgrimpa Ekspedicio ascendis la plej altan montpinton de la mondo Ĝomolangma tra ĝia norda deklivo sekvante la pionirajn spurojn de la ĉinaj montgrimpistoj Vang Fuĝoŭ, Gonpo (tibetano) kaj Kju Jinhua, kiuj konkeris la montgiganton en 1960.

La virino el la naŭ sukcesintoj estas Phanthog, vicedestro de la ekspedicio, kaj la aliaj ok sportistoj estas Sodnam Norbu, Loĝoj, Hoŭ Ŝengfu, Samĝub, Granda Punco, Kunga Pa-

sang, Cering Toĝje kaj Apĉen. Ili ĉiuj estas tibetanoj, escepte de la hana Hoŭ Ŝengfu. Kamaradino Phanthog estas virino, kiu la unua en la mondo ascendis Ĝomolangma-n tra ĝia norda deklivo, kaj tio montris la ĉiovenkan revolucian spiriton de la ĉinaj virinoj. Dum la montgrimado la 9 sportistoj de la Ĉina Montgrimpa Ekspedicio kun sentimeco venkis multajn neatenditajn malfacilojn. Ilia venko montras, ke la montgrimpa sporto de nia lando ricevis novan disvolviĝon dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. Montgrimado estas sporto valora por



*Phanthog (tibetanino)*




*Sodnam Norbu (tibetano)*




*Loĝoj (tibetano)*






*Hoü Šengfu (hano)*



*Samgub (tibetano)*



*Granda Punco (tibetano)*


la homaro en batalo kontraŭ la naturo. En la grimpadado de Ĝomolangma kaj aliaj montoj, ĉinaj sportistoj ne nur estis provitaj de diversaj malbonegaj naturaj kondiĉoj, harditaj fizike kaj kulturitaj je la revolucia spirito timi nek malfacilojn nek morton kaj la penso de kolektivismo, sed ankaŭ akiris materialojn por scienca esploro kaj ekonomia konstruado per esplorado kaj mezurado pri la klimato, to-

pografio, geologio kaj geomorfologio de altaj montoj kaj fiziologiaj reakcioj de homoj en tia medio.


La Ĉina Montgrimpa Ekspedicio komencis sian ĉifojan aktivadon meze de marto de la kuranta jaro. Post starigo de baza kampadejo ĉe la loko kun absoluta alteco de 5,000 metroj, ĝi starigis unu post alia 5 altmontajn kampadejojn respektive en la lokoj kun absoluta al-

*Grandajn sukcesojn! — Tibetanoj prezentas sekalan vinon al la ekirontaj montogrimpistoj.*





*Kunga Pasang (tibetano)*



*Cering Toĝje (tibetano)*



*Apĉen (tibetano)*

teco de 5,500 m., 6.500 m., 7,007 m. kaj 7,600 m. Tuj poste ĝi starigis la sesan altmontan kampadejon kaj sturman kampadejon respektive en la lokoj je 8,200 m. kaj 8,600 m. altaj.

Post sukcesa ascendo sur la montpinton, la 9 sportistoj descendis kaj emocie rakontis al mi pri ilia sturmado al la supro de Ĝomolangma.

La vetero de la regiono de Ĝomolangma en majo estas la plej bona en la tuta jaro. Sed eĉ en tiu tempo blovas ventego pli forta ol tiu de 8 gradoj kaj regas frosto de ĉ. 30 gradoj C. sub la nulo en loko sur Ĝomolangma je 7,000 metroj alta. Kaj krome la vetero estas kaprica kaj tre malfacile antaŭdirebla.

Post kvarfoja akomoda marŝado, la sturmantoj de la ekspedicio ekiris de la baza kampadejo en du grupoj respektive je la 17-a kaj 18-a de majo, laŭ decido de la partia komitato de la Ĉina Montgrimpa Ekspedicio. De la 20-a ĝis la 23-a blovas ventego de 8 aŭ 9 gradoj kaj neĝadis. La sturmantoj atingis la kampadejon sur la loko je 7,600 m. alta respektive je la 20-a kaj la 21-a por atendi novan ordonon.


En la fortega neĝblovasado, iliaj tendoj fiksitaj per fingrodikaj nilonaj ŝnuroj kliniĝis malorde. La sportistoj ne povis ĝustatempe

prepari manĝaĵon per kerosena kuirforno nek iri el la tendoj por preni kaj degeligi neĝon en trinkakvon, sed ili ĉiuj restis viglanimaj kaj atendadis persiste novan ordonon en kvar diurnoj.

En la 24-a kaj 25-a, iom malfortiĝis la neĝblovasado. Sodnam Norbu kaj aliaj tri membroj daŭre grimpis kaj atingis la sturman kampadejon sur la loko je 8,680 metroj alta, posttagmeze de la 25-a. Du el ili tuj daŭrigis senripeze sian marŝadon okcidenten sur la nordorienta firsto de Ĝomolangma kaj atingis la supron de la plej danĝera zono la "Dua Ŝtupo" sur tiu vojlinio kaj elektis vojo por plue grimpi supren.

En la 26-a, en la loko je 8,000 metroj alta subite ekblovis ventego de ĉ. 10 gradoj. Kvankam la kvar sportistoj leviĝis antaŭ tagiĝo, tamen ili ne povis iri el la tendo kaj devis restadi en ĝi ĝis la 14-a horo. Kaj samtempe, ankaŭ la aliaj membroj, kiuj jam atingis la altecon de 8,300 metroj, ne povis marŝi plue laŭ la plano. Malgraŭ tio, la kvar pioniroj instalas ŝnurojn kaj metalan ŝtupetaron sur la firsto de la sturma kampadejo ĝis la "Dua Ŝtupo" kaj sur la rokmuro tri metrojn alta sub la supro de la "Dua Ŝtupo". Je 10 minutoj post la 15-a en tiu tago, la du grupoj de sturmantoj antaŭenpuŝiĝis en la ventego piediran-





*Al la pinto de Ĝomolangma*

te kaj fine venke kuniĝis ĉe la sturma kampadejo en alteco de 8,680 metroj. Vespere, ili ellaboris tie batalan projekton por la sturmo al la montsupro en la sekvanta tago.

En la mateno de la 27-a, malaperis la nuboj formitaj el blovita neĝo sur la supro de Ĝomolangma kaj aperis malofta bona vetero en la areo de la monto. Antaŭ la tagiĝo la sturmantoj ellitiĝis, sukcesis boligi akvon nur post klopo de pli ol unu horo pro maldenseco de la aero kaj frostego kaj iom trinkis kaj manĝis. Je la 8-a, ili komencis marŝi al la supro de la plej alta monto de la mondo kunportante ruĝan kvinstelan flagon, metalan mezuran signalon, kameraojn kaj oksigenujojn.


De la sturma kampadejo ĝis la montsupro distancas nur je duonkilometro. Sed pro ekstrema maldenseco de la aero, en iuj lokoj la sturmantoj devis profunde spiregi dekelkajn fojojn post ĉiu paŝo, sin apogante sur la montgrimpa pioĉo. En la jaro 1960, Vang Fuĝoŭ kaj aliaj du montgrimpistoj atingis la montsupron de Ĝomolangma post 19-hora grimado ekde la sturma kampadejo en loko je 8,550 metroj alta. Ĉifoje, Phanthog, Sodnam Norbu kaj la aliaj 7 sportistoj multege konsumis siajn for-



*Amuzo en kampadejo*




*Urbanoj de Lasao varme bonvenigas la sukcesintajn montgrimpistojn.*



tojn dum la montgrimpado en 10 tagoj, sed ili ĉiuj montris sin sentimaj antaŭ la malfaciloj. Dum la marŝado, Sodnam Norbu ĉiam iris en la fronto. Kunportante oksigenujon kaj anaslanugan dormosakon sur la dorso Phanthog neniam postigis je unu paŝo de aliaj. Ili marŝis malrapide en vico sur la kruta montfirsto. 30 minutojn post la 9-a ili atingis la supron de la "Dua Ŝtupo". Tiam la vento plifortiĝis. La ekspedicianoj daŭrigis sian marŝadon kontraŭ la ventego kaj baldaŭ atingis la bazon de la piramidosimila pinto de Ĝomolangma. Ili enspiris iom da oksigeno, ripozis momenton kaj plue marŝis kun helpo de montgrimpistaj botoj sur la piedoj kaj montgrimpista pioĉo en mano. Post pena luktado ili transpasis du krutajn deklivojn kovratajn de neĝo kaj glacio kaj atingis lokon je 50 metroj fore de la pinto. Kiam ili estis pretaj fari la lastan sturmadon al ĝi, ili trovis ke preskaŭ vertikala glaciac deklivo baras al ili la vojon. La sportistoj devis ĉirkaŭiri ĝin, marŝi okcidenten trans rokmuro kaj poste sin direkti rekte al la montsupro. Super la montsupro muĝis ventego de 7 aŭ 8 gradoj kaj ru-

liĝadis nuboj. La sturmantoj uzis 1 horon kaj 30 minutojn por traŭri la lastajn malfacilegajn 50 metrojn kaj ascendi la plej altan montpinton de la mondo. La ascendo sur la pinto sukcesis je 30 minutoj post la 14-a horo laŭ la Pekina Tempo. Kiam Hoŭ Ŝengfu raportis, en la nomo de ĉiuj sturmantoj, la ĝojigan novaĵon al la baza kampadejo, tuj eksonis laŭtaj huraoj supre kaj sube de la monto. La 9 sportistoj de nia lando disvolvis la ruĝan kvinstelatan flagon kaj starigis la ruĝan metalan mezuran signalon tri metrojn altan kun surskribitaj ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj "la Montgrimpa Ekspedicio de la Ĉina Popola Respubliko", faris fotojn kaj filmon pri la montsupro, mezuris la dikecon de la neĝtavolo sur ĝi, kolektis specimenojn de tieaj glacio kaj ŝtonoj kaj lasis fari cibernetican kardiogramon. Tiuj faroj kreis tre gravajn kondiĉojn kaj havigis al ni valorajn materialojn por precize mezuri la altecon de Ĝomolangma kaj fari pluajn sciencajn esplorojn. La sportistoj restadis 1 horon kaj 10 minutojn sur la montsupro kaj poste ili komencis descendi de ĝi kaj ĉiuj sekure revenis al la baza kampadejo.



ENCIKLOPEDIETO:

## Ĝomolangma

**L**A monto Ĝomolangma situas ĉe la limo inter nia lando kaj nia amika najbaro Nepalo. Ĝia norda deklivo estas en la Tibeta Aŭtonoma Regiono de nia lando kaj la suda en Nepalo.

Ĝomolangma altas je 8,882 metroj super la marnivelo, kaj estas la plej alta el la montoj de Himalajo kaj ankaŭ el tiuj de la mondo. “Ĝomo” en la tibeta lingvo signifas diinon kaj “langma” la trian. Apud Ĝomolangma troviĝas aliaj kvar montoj, kaj ĝi estas la tria en la vico, tial ĝi ricevis tiun nomon.

De la 18-a jarcento, esploristoj kaj montgrim-paj ekspedicioj de iuj landoj venis unu post alia al Ĝomolangma por malkovri ĝian sekreton. Sed nur en la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento iuj sukcesis surgrimpi la pinton de Ĝomolangma tra ĝia suda deklivo. De la jaro 1921 ĝis la jaro 1938, esploristoj de iu lando sep-foje provis ĝin surgrimpi tra la norda deklivo, sed ĉiuj ili malsukcesis kaj iu el ili eĉ perdis sian vivon. Tial, ili deklaris ke la norda deklivo estas “negrimpebla” kaj tie estas nur “vojo al morto”.

La naturaj kondiĉoj de Ĝomolangma estas eksterordinare komplikaj, precipe la klimato de ĝia norda deklivo estas pli malbona kaj la topografio pli kruta ol tiuj de la suda deklivo. Ĝomolangma estas tutjare kovrita de glacio kaj neĝo. En ĝiaj

valoj troviĝas kelkaj grandaj glaciriveroj. Ĝia Ĵongbuk-glacirivero formiĝinta el la tri kuniĝintaj grandaj branĉoj Orienta, Okcidenta kaj Meza estas fame konata. La klimato de la supro de Ĝomolangma estas tre malbona kaj dum la tuta vintro de oktobro ĝis la sekvanta marto blivas sur ĝi nordokcidenta vento fortega iam eĉ super 12 gradoj. En la fino de majo ekblovas la sudorienta musono, kiu daŭras ĝis la fino de septembro. En tiu periodo sur la montpinto neĝo povas okazi en iu ajn tempo, kaj tiea temperaturo estas tre malalta, ordinare 30-40 gradojn C sub la nulo.

Por surgrimpi la montpinton de Ĝomolangma tra la norda deklivo, oni devas ne nur venki teruran froston, maldensecon de oksigeno, krutajn rokdeklivojn kaj klifojn, fendojn de glacirivero, glacifalon, lavangon kaj neĝoŝtormon, sed ankaŭ transpasi la du plej danĝerajn zonojn “Bej-aŭ” kaj la “Dua Ŝtupo”. La supro de “Bej-aŭ” altas je 7,007 metroj super la marnivelo kun meznombra oblikveco de 70 gradoj. Ĝia rokmuro estas tutjare kovrita de neĝo kaj glacio kun nesondebla profundeco kaj estas plej danĝera loko de glacifalo kaj lavango. La “Dua Ŝtupo” kun kruta kaj glata rokmuro situas de 8,570 ĝis 8,600 metroj super la marnivelo kaj ĝia meznombra oblikveco estas 60 ĝis 70 gradoj.



La 27-an de majo niaj naŭ gemontgrimpestoj disvolvis la  
brilan ruĝan kvinvelan flagon sur la supro de Ĝomolangma.

# Ĉarmo de la Tria Poluso





*Dekstre:* La montgrimpistoj starigis sur la montpinto ruĝan metalan signalon altan je tri metroj.

*Sube maldekstre:* La heroaj montgrimpistoj sukcesis ascendi la montpinton.

*Meze sube:* Filmado sur la pinto de Ĝomolangma

*Sube dekstre:* Ili mezuras la dikecon de la neĝ-tavolo sur la montpinto kaj kolektas specimenojn de la tieaj neĝo kaj glacio por pretigi valorajn materialojn al esplorado pri Ĝomolangma.





Phanthog (fronte), vicestrino de la montgrimpa ekspedicio, sturmas la pinton de Gomolangma, kune kun siaj kamaradoj.







Sciencaj laborantoj en la kampadejo de absoluta alteco de 6.500 metroj faras cibernetikan registradon de kardiogramo al la montgrimpistoj aktivantaj en la loko de absoluta alteco de pli ol 8.000 metroj.

Spite al ventego, ili marŝas al la montpinto kun la revolucia spirito timi nek malfacilojn nek morton.



Sciencaj laborantoj persistas en studo de revolucia teorio en kampadejo de absoluta alteco de 5,400 m.

Mezuristoj observas la pinton de Ĝomolangma.



Sturma kampadejo estas starigita sur loko de absoluta alteco de 8,680 m.







Dum sia scienca esplorado en la regiono de Ĝomolangma studentoj de la Nankina Meteologia Kolegio devenintaj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaptas ĉiujn ŝancojn por fari enketadon al la tieaj loĝantoj.

# Vizito de Vicĉefministro Deng Hiaŭping al Francio

**L**AŬ invito de la registaro de la Respubliko de Francio, Vicĉefministro Deng Hiaŭping de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko faris oficialan viziton al Francio en majo de 1975.

En la vizito Vicĉefministro Deng Hiaŭping havis kun Prezidanto V. G. D'Estaing de la Respubliko de Francio kaj Premiero J. Chirac de la franca registaro unu post alia vastajn, profundajn kaj fruktodonajn interparoladojn

en amika atmosfero pri la internaciaj problemoj interesaj al ambaŭ flankoj kaj pri la disvolvo de la rilatoj inter ambaŭ landoj. En la interparoladoj, Vicĉefministro Deng Hiaŭping invitis, je la nomo de Prezidanto Ĝu De kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj, Prezidanton V. G. D'Estaing viziti Ĉinion, kaj je la nomo de Ĉefministro Ĝou Enlaj, li invitis Premieron J. Chirac viziti Ĉinion en konvena tempo. Prezidanto V. G. D'Estaing

*Vicĉefministro Deng Hiaŭping estas solene akceptata de franca Premiero J. Chirac post atingo de Parizo je la 12-a de majo.*







*Vicĉefministro Deng Hiaŭping kaj Prezidanto Valery Giscard D'Estaing de la Respubliko de Francio havas amikan interparoladon.*

kaj Premiero J. Chirac kun plezuro akceptis la invitojn. Ambaŭ flankoj decidis, ke la ministroj de eksteraj aferoj de ambaŭ landoj faros intertraktadon laŭ bezono,

ke ambaŭ landoj establos miksan komisionon por akceli pluan disvolvon de la ekonomiaj kaj komercaj rilatoj inter ambaŭ landoj. Krome, Kiaŭ Guanhua, la ministro de eksteraj aferoj de Ĉinio, havis interparoladon kun J. Sauvagnargues, la ministro de eksteraj aferoj de Francio, en kiu ili esploris konkretajn vojojn por oftigi la politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn interŝanĝojn de ambaŭ landoj.

Vicĉefministro Deng Hiaŭping kaj lia sekvantaro vizitis en Francio la faman industrian urbon Liono, farmon en antaŭurbo de Parizo, la antikvan vilaĝon Des Baux, la nuklean centron Marcoule de Gard-departemento kaj la Versajlan Palacon, kaj estis varme akceptataj de la franca popolo.

Frue antaŭ pluraj jarcentoj Ĉinio kaj Francio jam havis amikajn interligojn pere de la fama "Silka Vojo". En la lastaj pli ol 20 jaroj, precipe post la starigo de diplomatia rilato inter ambaŭ landoj, pli kaj pli oftigas la amikaj interŝanĝoj. En la pasinteco Liono varme akceptis ĉinajn artajn, sportajn kaj studajn grupojn. Vicĉefministro Deng Hiaŭping estis varme akceptata de la popolo de Liono. Kiam Vicĉefministro Deng Hiaŭping vizitis la antikvan vilaĝon Des Baux, lin varme bon-



*Vicĉefministro Deng Hiaŭping vizitas la Versajlan Palacon.*



*Vicĉefministro Deng Hiaŭping vizitas la antikvan vilaĝon Des Baux, en akompano de M. Poniowski, ministro de ŝtato kaj internaj aferoj de Francio, kaj la vilaĝanoj bonvenigas la ĉinajn gastojn en solenaj naciaj ritoj.*



venigis vilaĝanoj en helkoloraj festaj naciaj kostumoj rajdante sur ĉevaloj aŭ ludante antikvajn muzikilojn. La vilaĝestro rakontis al Vicĉefministro Deng Hiaŭping pri la longa historio de la montvilaĝo kaj konigis al la ĉinaj gastoj ĝiajn ĉefajn historiajn restaĵojn. Kiam la ĉinaj gastoj forlasis la vilaĝon, la vi-

laĝanoj svarme rapidis al la ĉinaj gastoj, entuziasme aplaŭdis kaj varme manpremis adiaŭe al ili. En la nuklea centro Marcoule, administranto de la Proviza Fako de Atoma Energio de Francio rakontis al la ĉinaj gastoj la historion kaj nunan staton de utiligo de atoma energio en Francio, poste la ĉinaj gastoj pri-



*Francoj varme bonvenigas la ĉinajn gastojn.*

rigardis la reaktoron de la nuklea centralo Fenikso.

Por esprimi bonvenigon al la vizito de Vicĉefministro Deng Hiaŭping al Francio, la Franca-Ĉina Amika Asocio okazigis en Parizo mitingon kun ĉ. 2,000 partoprenantoj de diversaj rondoj. En la kunveno estroj de la asocio faris paroladojn. Ili varme laŭdis la ĉinan popolon pro ĝiaj sukcesoj en la konstruado kaj la venkoj en la eksteraj aferoj, dankis la subtenon de la ĉina popolo al la franca popolo en ĝia batalo por nacia sendependeco,

kaj deziris senĉesan progreson de la amikeco inter la franca kaj ĉina popoloj. Iliaj paroladoj rikoltis varmajn aplaŭdojn. La estraro de la ĵurnalo *La Ruĝa Humaneco* okazigis en Parizo bonvenigan mitingon partoprenatan de pli ol 1,000 laboruloj. Politikaj direktoroj de la ĵurnalo faris paroladojn en la mitin-



*Yves Milhoud, prezidanto de la Pariza Konsilo okazigis akcepton honore al Vicĉefministro Deng Hiaŭping en la urbodomo. En la foto: La gastiganto kaj gastoj iras el la domo.*





Vicĉefministro Deng Hiaŭping okazigis lunĉon honore al Prezidanto Valery Giscard D'Estaing.

go. Ili diris, ke la vizito de Vicĉefministro Deng Hiaŭping de Ĉinio al Francio estas “grava afero en la historio kaj por la nuna internacia situacio”. La Centra Politika Buroo de la Franca Marksisma-Leninisma Komunista Partio kaj la Franca Revolucia Komunista Partio (marksisma-leninisma) publikigis deklarojn por esprimi bonvenigon al la vizito de Vicĉefministro Deng Hiaŭping. La deklaro de la Centra Politika Buroo de la Franca Marksisma-Leninisma Komunista Partio diris: “Francio kaj la okcidenta Eŭropo apartenas al tiu mondo, kiu estas ĉiuflanke regata kaj minacata de la du superpotencoj”, kaj “Eŭropo, precipe Francio, povos konsiderinde plibonigi la kondiĉojn de ilia defendo kaj ilia rezisto kontraŭ agreso en ajna formo, se ili plifirmigos siajn interrilatojn kun la granda Ĉina Popola Respubliko kaj la tria mondo.”

Multaj ĵurnaloj de Francio publikigis artikolojn aŭ komentariojn pri la oficiala vizito de Vicĉefministro Deng Hiaŭping al Francio, akcentante la bonajn interrilatojn inter Francio kaj Ĉinio kaj la senĉese progresantan amikecon inter la du popoloj. La ĵurnalo *La Mondo* publikigis artikolon *Longa Marŝo de Amikeco*. La artikolo diris: “Proponante toston en la 14-a de septembro de 1973 en Pekino, Prezidanto Pompidou deziris, ke la rilatoj inter Francio kaj Ĉinio estu ‘Longa Marŝo’ de amikeco. La vizito de Vicĉefministro Deng Hiaŭping al Francio post malpli ol 2 jaroj konsistigas novan paŝon antaŭen. La vizito devas esti rigardata kiel grava evento en la rilatoj inter Ĉinio kaj Francio sur la sama fundamento de la vojaĝo de la prezidanto en 1973.”





## OFICIALAJ RILATOJ STARIGITAJ INTER ĈINIO KAJ EEK

Laŭ invito de la Ĉina Popola Instituto de Eksteraj Aferoj S-ro Christopher Soames, vicprezidanto de la Komisiono de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, k.a. vizitis Ĉinion en majo de la kuranta jaro.

Ĉefministro Ĝou Enlaj kaj Vicĉefministro Li Hiannian sinsekve intervidiĝis kaj faris amikajn konversaciojn kun Vicprezidanto C. Soames k.a. Ministro de Eksteraj Aferoj Kiaŭ Guanhua kaj Vicprezidanto C. Soames k.a. interŝanĝis opiniojn pri multaj internaciaj problemoj kaj pri la rilatoj inter Ĉinio kaj la Eŭropa Ekonomia Komunumo, kaj ambaŭ flankoj interkonsentis pri starigo de oficialaj rilatoj inter la Ĉina Popola Respubliko kaj la Eŭropa Ekonomia Komunumo. La ĉina registaro decidis sendi sian reprezentanton al la Eŭropa Ekonomia Komunumo.

Posttagmeze de la 8-a de majo, Vicprezidanto C. Soames donis akcepton por ĵurnalistoj en Pekino, en kiu li proklamis

ke ambaŭ flankoj jam venis al la interkonsento pri starigo de oficialaj rilatoj, kaj koncerne la problemon de Tajvan li proklamis: "Ĉiuj membro-landoj de la komunumo agnoskis la registaron de la Ĉina Popola Respubliko unika laŭleĝa registaro de Ĉinio kaj koncerne la problemon de Tajvan prenis la starpunktojn akcepteblajn por la popola respubliko. Laŭ tiuj starpunktoj, mi konfirmas, ke la komunumo, ĝuste kiel jam proklamis la proparolanto de la komisiono en Bruselo je la 30-a de aprilo, ne plu konservos ajnan oficialan rilaton aŭ faros ajnan kontrakton kun Tajvan."

## RUMANA INDUSTRIAL EKSPOZICIO EN PEKINO

La Rumana Industria Ekspozicio, kiu spegulis la sukcesojn de Rumanio en ekonomia konstruado, okazis en nia ĉefurbo Pekino ĉijare en junio.

En la halo de la Pekina Ekspoziciejo estis montritaj elektraj motoroj, maŝinoj, produktajoj de metalurgio, kemiindustrio kaj elektroniko, kaj modeloj de drilegoj, ŝipoj kaj lokomotivoj. Sur la placo de la ekspoziciejo staris diversaj kamionoj, traktoroj kaj aliaj agrikulturaj maŝinoj. La diagramoj en la ekspozicio

*Urbanoj de Pekino  
en la Industria  
Ekspozicio de la  
Rumana Socialisma  
Respubliko*



montris, ke post la liberiĝo de Rumanio en 1944, nun ĝia industria produkta valoro jam kreskis je 30-oblo. La produktokvanto de maŝinfabrikado en 1974 kreskis je 93-oblo kompare kun tiu de 1938, kaj tiu de kemiindustrio je 173-oblo. En agrikulturo, la totala produktokvanto de tritiko kaj maizo kreskis je pli-ol-du-oblo kompare kun tiu antaŭ tridek jaroj, kaj Rumanio jam havas superbezonan grenon. Sekve de la prospera disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo, ankaŭ scienco, edukado kaj la higiena kaj sanitara afero senĉese akiris novajn sukcesojn, kaj la nivelo de la materia kaj kultura vivo de la popolo estis grandmezure altigita. La ekspozitaj objektoj, modeloj kaj diagramoj pruvis, ke la rumana popolo, sub la gvido de la Komunista Partio de Rumanio, firme eltenis premadon de imperiismo, persistis en la principo de sendependeco kaj memdecido, kaj akiris ĝojindajn sukcesojn en la socialisma konstruado dank' al sia diligenta laborado.

En la amikeca galerio de la halo de la ekspozicio, la giganta foto en kiu Prezidanto Maŭ Zedong kaj Ĝenerala Sekretario Nicolae Ceausescu varme manpremas en intima intervidiĝo, la foto en kiu Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj estas kune kun la rumanaĵ partiaj kaj registaraj gvidantoj en Rumanio, kaj aliaj kortuŝaj fotoj pri amikaj intervizitoj de la ĉina kaj rumana popoloj, ĉiuj forte impresis la rigardantojn

per bela amikeco inter la ĉina kaj rumana popoloj.

### BONVENIGON AL INFANA ĤORO ROSNY

Pekinaj loĝantoj aŭskultis kun ĝojo la kantadon de la Aŭstralia Infana Ĥoro Rosny en la teatro de la Pekina Nacieca Kultura Palaco.

La ĥoro konsistanta el 50 infanoj ofte faras kantadon en diversaj ŝtatoj de Aŭstralio post sia fondiĝo kaj trovis bonvenigon de siaj samlandanoj. La ĥoristetoj ne nur varme amas muzikon, sed ankaŭ prenas ĝin kiel interligilon por plifirmigi la amikecon inter diversaj popoloj. En la ĉifoja kantado en Ĉinio, ili transdonis per fervorplenaj kantoj la amikecon de la aŭstraliaj popolo kaj infanoj al la ĉinaj.

La infana ĥoro kun plena gajeco kantis la aŭstralian popolkanton konatan de la ĉina popolo *Tondi Ŝafojn*, kiu montras la ĝojon de la ŝaftondistoj pri la fruktoj de sia laboro. La popolaj kantoj kantitaj de ili *Kanto de Paŝtistoj*, *Kanto pri Juneco* kaj *Aŭstralia Sunleviĝo* prikantas la belan kaj riĉan landon Aŭstralion. Ilia viveplena kantado de tempo al tempo gajnis aplaŭdon de spektantoj. La ĥoristetoj plengorĝe kantis en la ĉina lingvo la ĉinajn kantojn *Mi Amas Tian-anmen-pordegon de Pekino*, *Mi Estas Malgranda Komunumano* kaj *Malgranda Pinarbo*, kaj per tio rikoltis tondrajn aplaŭdojn tra la tuta teatro.

Post prezentado, la ĉina vicĉefministro Vu Gujhan ascendis la scenejon kaj fotiĝis kune kun la artistetoj.





## POSTRESTAĴO DE MINEJO ANTAŬ PLI OL 2,000 JAROJ

Ĝin trovis niaj arkeologiaj laborantoj en la monto Tonglu, Daje-gubernio en Hubej-provinco. La minejo longas ĉ. 2 kilometrojn de la nordo al la sudo kaj larĝas ĉ. 1 kilometron. La plej profunda loko distancas de la tersurfaco pli ol 50 metrojn. En la ŝaktoj oni trovis multe da lignaj laboriloj uzitaj por apogi la plafonon kaj pli ol cent laborilojn uzitajn por produkto kaj vivo. Ĉiuj lignaj laboriloj estas faritaj el unuopaj lignopecoj per ĉizado kaj tranĉado sen interkunigoj kaj spuro de segado. Laŭ takso de arkeologoj ĝi estas el la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno (770-475 a.K.) kaj Militantaj Regnoj (475-221 a. K.).

En tiu tereno oni trovis du ŝaktojn kun distanco de pli ol 300 metroj inter si. La laboriloj de unu el ili estas strukture simplaj el mallongaj trunkoj kun interna spaco de nur 60 cm. kaj la tie elterigitaj laboriloj estas ĉiuj el bronzo aŭ ligno, el kio oni opinias ke ĝi estas el la periodo de Printempo kaj Aŭtuno. La lignoj uzitaj en la laboriloj de la alia ŝakto estas pli longaj kaj dikaj kaj ankaŭ la strukturo estas videble plibonigita ol en la unua. La laboriloj tie elterigitaj estas ĉiuj el fero aŭ ligno, el kio oni povas rezone konkludi, ke ĝi estas el la meza aŭ posta periodo de Militantaj Regnoj.

La unuaj studoj pri la elfosaĵoj de la du ŝaktoj montras ke en sia tempo la sklavoj jam efike utiligis la formojn de oblikva kaj vertikala ŝaktoj kaj de horizontala ga-

lerio por ekspluati la minejon en dividitaj partoj. Kaj samtempe oni jam racie solvis la teknikajn problemojn de aerumo, drenado, levado, lumigado kaj protektado de la ŝakto kaj galerio.

La trovo de tiu mineja postrestaĵo liveras valoran materialon por esplori la antikvan historion pri geologio, minekspluatado kaj metalurgio de nia lando kaj provizas nin per konkreta materialo por koni la staton de produkto kaj klasbatalo en la transira periodo de sklava socio al tiu de feŭdisma kaj la historian fakton, kiel la sklavoj siatempe puŝis la historion antaŭen.

## KUNLABORA RETO DE SCIENCA ESPLORADO DE AGRIKULTURAJ PLANTOJ EN HEBEJ-PROVINCO

La laborantoj de la Hebeja Instituto por Agrikulturaj Plantoj profundigis en la vastan kamparon, kaj starigis, alprenante la rimedon de kombino de faka esplorado kun la sciencaj eksperimentoj fare de la amasoj, kunlaboran reton de scienca esplorado de agrikulturaj plantoj, kiu ampleksas 171 produktajn brigadojn de la 73 gubernioj kaj urboj de la tuta provinco.

En la lastaj jaroj la kunlabora reto jam resumis el spertoj kulturajn metodojn por produkti po muo 500 kg. da somersemita milio (antaŭe nur 100-150 kg.) kaj pli ol 750 kg. da tritiko, maizo kaj sorgo kulturataj interkruciĝe. Plie ĝi elselektis bonspeciojn kaj hibridigitajn speciojn de tritiko Hiangjang kun pomua produkto de pli ol 400 kg., maizo Gidan n-ro 2 kaj somere semata sezamo Giĝi n-ro 1 kun pomua produkto de pli ol 90 kg. Nun tiuj altproduktaj rimedoj kaj bonspecioj estas disvastigataj en la tuta provinco por akceli ĝian agrikulturan produkton.



# Navigado al la for'

*vira solo*

Vortoj de Ĉen Ĉu

Muziko de Gian Er

Libere kaj vaste

*accel.*

*allgt°.* Serene kaj senĝene

Kun aŭ-ror' en

front', spit' al vent' kaj


ond', mi o-ce-an-ŝi-pon

sti-ras al fo-ra ho-ri-zont'.

Flir-tas ru-ĝa kvin-ste-la l'flag'. re-vo-lu-ci-a a-mi-

kec' por-ti-ĝu tra la mond'.

The musical score is written in treble clef with a key signature of one sharp (F#) and a 4/4 time signature. It features various musical notations including slurs, accents, and dynamic markings. The lyrics are in Esperanto and describe a voyage across the ocean.



II.  
kun vo- lont'.

*accel.*

*allgt.*  
Kun aŭ-ror' en front'.

spit' al vent' kaj ond', mi

o- ce- an- ŝi- pon sti- ras al ĉi- u part' de l' mond'.

L'In- ter- na- ci- o re- so- nas en kor', re- vo- lu- ci- a a- mi-

*rall.*  
kec' por- ti- ĝu tra la mond', re- vo-

lu- ci- a a- mi- kec' por- ti- ĝu tra la

*a.t.*  
mond'.



# Li konservas la naturon de ordinara laborulo

**E**N fabrikoj, antaŭurbaj komunumoj aŭ sur stratoj de Siping de Gilin-provinco, oni povas ofte vidi, ke la unua sekretario de la urba partia komitato Ĉen Zengjaŭ laboras kune kun amasoj. Kvankam li jam havas pli ol 50 jarojn, tamen li restas ĉiam vicleplena kaj laboras tiel energie, ke ŝvito ofte tramalsekiĝas lian tutan veston.

Ĉen Zongjaŭ eklaboris kiel la unua sekretario de la partia komitato de Siping en aŭtuno de 1970. En la Granda Proleta Kultura Revolucio li pli profunde ekkomprenis, ke estas

unu el la gravaj metodoj por kontraŭbatali kaj preventi reviziismon la instruo de Prezidanto Maŭ, ke **“La kadroj de niaj Partio kaj ŝtato estas ordinaraj laboruloj kaj ne grandsinjoroj rajdantaj sur la nuko de la popolo”** kaj **“Estas necese persisti pri la sistemo de partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro.”** Li decidis heredi kaj disvolvi la bonan tradicion de la Partio kaj klopodi por konservi la naturon de ordinara laborulo. De pli ol 4 jaroj, li persiste profundigis en praktikon kaj inter amasojn kaj partoprenis en fizika laboro.



*Inter popolkomunumanoj*

Ĉiujare meznombro du trionojn de sia tempo li pasigis en bazaj unuoj. En 1974, li laboris sume pli ol 200 tagojn en fabrikoj kaj komunumoj. La amasoj intime nomas lin “bona gvidanto kies korpo ne apartiĝas de fizika laboro kaj kies koro ne de la amasoj”.

Antaŭ kelkaj jaroj parto de la stratoj en Siping estis ankoraŭ ne pavimita kaj maloportuna por irado kaj veturado. Por kontentigi la bezonojn de la produkto kaj konstruado, la urba partia komitato decidis mobilizi amasojn al enordigo kaj konstruado de stratoj. Ĉen Zongjaŭ kaj kamaradoj de la Urbokonstrua Administracio profundiĝis inter loĝantojn por fari enketadon kaj trovis, ke la skorio forjetita de kemia fabriko, kiu produktas kalcian karbonidon, kaj la cindro de bruligita karbo bone taŭgas por konstrui murojn kaj pavimi vojojn. Li do konstruis kune kun aliaj kadroj de la urbo trotuaron, uzante tiujn materialojn por fari betonon, sub la brula suno.

Informiĝinte pri tio multaj fabrikoj, oficejoj kaj trupoj de la urbo ekmoviĝis kaj en daŭro de 26 tagoj 13,265 kvadrataj metroj da vojofaco estis pavimitaj kun partopreno de pli ol 19,000 homfojoj. Per la sama metodo kadroj kaj loĝantoj de diversaj distriktoj riparigis 23 stratetojn.

Dum la pasintaj novjaraj ferioj la tuta urbo disvolvis movadon de subteno al agrikulturo per transporto de sterko al kamparo en kiu partoprenis ankaŭ Ĉen Zongjaŭ kaj aliaj gvidantaj kadroj de la urba partia komitato spite al frosta vintra vento. Tiamaniere ekleviĝis nova alta tajdo de subteno al agrikulturo en la tuta urbo. Sur la ŝoseoj seninterrompe cirkulis veturiloj kaj homoj transportantaj sterkon, tiel ke en malpli ol dek tagoj oni transportis al kamparo 47,600 tunojn da sterko kun partopreno de pli ol 220,000 homfojoj kaj kontribuis por akiri riĉan rikolton de agrikulturo en la kuranta jaro.

En la koro de Ĉen Zongjaŭ ĉiam okupas lokon la amasoj kaj li diligente kaj sincere servas al la popolo. Iujare ne longe antaŭ la alveno de pluva sezono, kiam li informiĝis ke pezaj pluvoj falos en la venontaj tagoj, li



*Post laboro*

ekpensis ke parto de loĝdomoj jam malnoviĝis kaj devas esti riparita antaŭ ol alveno de la pluva sezono. Li do iris inter amasojn kune kun aliaj gvidantaj kadroj por kontroli la sekurecon de loĝdomoj. Al kadukiĝintaj domoj, li tuj ordonis koncernan unuon por ĝustatempe fari riparadon. La koncernaj dommastroj tre kortuŝiĝis kaj diris: “Tio estas prizorgo de la Partio kaj Prezidanto Maŭ al ni.”


Iuvespere, kiam Ĉen Zongjaŭ apenaŭ revenis hejmen, venis al li onklo Jang de la antaŭurbo, kiu akompanis komunumanon vunditan de ĉevalĉaro al hospitalo. Ĉar ĉiuj malsanulaj litoj de la hospitalo estis okupitaj, li do venis al li por peti helpon. Malgraŭ laciĝo kaj malsato, Ĉen Zongjaŭ tuj forlasis la hejmon kaj trovis por la vundito liton en alia hospitalo. Nur post tio li revenis kune kun la onklo al sia hejmo por kune preni manĝon kaj detale informiĝi de tiu pri la produktado de la kamparo kaj la vivo de la komunumanoj.

Ĉar Ĉen Zongjaŭ ĉiam zorgas la amasojn, tial la lastaj tre fidus lin. Laboristoj, kamparanoj kaj oficistoj ofte skribas aŭ venas al li por doni informon aŭ prezenti proponojn. Foje, oni diris al li ke por kontentigi la bezonojn de la disvolviĝanta produkto necesas antaŭzorgi la akvoprovizadon kaj samtempe

proponis efikan metodon por solvi la problemon. Li tre alte taksis tiun proponon kaj speciale kunvokis kunvenon de la konstanta komitato de la urba partia komitato por diskuti la aferon. La kunveno decidis instali akvedukton por konduki akvon de la antaŭurba akvorezervejo al la urbo. Kune kun la gvidantoj de la koncernaj unuoj li iris al la montregiono por esplori terformon kaj ellabori planon. Dank' al la kuna klopodo de la tuta urba popolo, baldaŭ estis konstruita akvedukto kun longeco de pli ol 15 kilometroj, kiu alkondukas kontinue akvon el la akvorezervejo kaj garantias la bezonojn de la produkto, konstruado kaj popola vivo en la urbo.

Post komenco de la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, li venis kun kadroj de la oficejo sub sia gvido al la Siping-a Unua Plastaĵa Fabriko por fari esploradon. Ili profundiĝis en laborgrupojn, komunan manĝejon kaj kaldronegejon kaj tie laboris kune kun la laboristoj. La amasoj diris al li, ke la ĉefa kaŭzo de malrapida progreso de la fabriko en la lastaj jaroj estas tio, ke mankas al la kadroj ambicio por strebi antaŭen. Li do mobilizis laboristojn kaj kadrojn de la fabriko al serioza studo de Marksismo-Leninismo kaj verkoj de Prezidanto Maŭ, al profunda disvolvo de la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, al kritiko kontraŭ reviziisma linio de Lin Biaŭ kaj kontraŭ doktrinoj de Konfucio kaj Mencio kaj al kritiko kontraŭ

*Ĉen Zongjaŭ (la maldekstra) interparolas kun laboristoj en plastaĵa fabriko.*



la mondkoncepto de neniofaraj maldiligentuloj kaj malkuraĝuloj kaj levis novan tajdon de revolucio kaj produkto en la tuta fabriko. Dank' al tio tute aliĝis la fizionomio de la fabriko kaj la totala produktovaloro de la fabriko en la pasinta jaro plimultiĝis per 3.5 fojoj kompare kun tiu en la jaro 1973.

Dum enketado en la Siping-a Instrumenta Fabriko Ĉen Zongjaŭ trovis, ke la spirito de la fabriko pri penema lukto en malfaciloj estas lerninda por la tuta urbo. En la komenco post la fondiĝo de la fabriko estis nur dekelkaj laboristoj, tri malnovaj maŝinoj kaj simplaj fabrikdomoj kun dekelkaj ĉambroj. Prenante Daking-anojn kiel siajn ekzemplojn, ili disvolvis la spiriton de penema lukto en malfaciloj kaj fabrikis per siaj propraj fortoj kelkdek ekipaĵojn kaj formis tri produktajn liniojn, kiuj jare produktas milionon da tranĉiloj por ilmaŝinoj.

Ĉen Zongjaŭ raportis tion en iu kunveno de la urba konstanta komitato kaj venis poste kune kun la komitatanoj al la fabriko por lerni de ĝi. Ili ricevis el tio profundan edukon kaj kune faris decidon lerni de la Siping-a Instrumenta Fabriko — bona ekzemplo en lerno de Daking. Sub edifo de tiu ekzemplo, la movado de “lerno de Daking en industrio” en la tuta urbo ĉiam pli altiĝis kaj la industria produkto prosperis tagon post tago. Ĉen Zongjaŭ diris kun profunda spertiĝo, ke kiel gvidanta kadro, li povas teni vastajn kaj striktajn rilatojn kun amasoj kaj bone plenumi laboron konfiditan de la Partio kaj la popolo, nur se li ofte profundiĝas inter amasojn por fari enketadon kaj partoprenas en fizika laboro.

De la lastaj jaroj li ĉiam entuziasme kaj vigle klopodas tagnokte por la revolucio, kvaŭzaŭ havante neelĉerpeblan energion. Eĉ en ferioj kaj dimanĉoj li ofte iras al laboristaj kaj kamparanaj amasoj por ricevi informojn kaj iafoje malgraŭ sia malsano li persistis en fizika laboro. Li decidis ĉiam teni la naturon de ordinara laborulo kaj revolucii por la tuta vivo.



# Moviĝanta seĝo por tekstilaj laboristinoj

Laboristinoj de kotonaj tekstilaj fabrikoj de Pekino komencis sidi sur moviĝantaj seĝoj anstataŭ piediri dum laborado.

Depost la fondiĝo de la popola respubliko, sur la bazo de senĉesa disvolvado de produkto, la popola registaro ĉiujare asignas specialan fonduson por plibonigi la laborkondiĉojn de tekstilaj laboristinoj. Oni kontinue aplikis renovigajn rimedojn por redukti la temperaturon kaj plibonigi la ventoladon en laborejoj kaj malpezigi la laborojn de laboristinoj. Tiel fundamente likvidiĝis la aĉa stato reganta en la tekstilaj fabrikoj de la malnova Ĉinio, ke en la laborejo estis sufoke kaj varmege kun aero polvoza kaj ofte okazis laborakcidentoj. Sed la laboristinoj ankoraŭ manipulis la maŝinojn starante. En laborejoj por ŝpinado de fajna fadeno kaj por teksado, oni devis rondiradi piede sume cirkaŭ 15 kilometrojn en unu skipa laboro. La laboro estis sufiĉe peza. Tio vekis grandan zorgemon ĉe la gvidantoj de tekstila industrio.


Frue jam antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, sub subteno de la fabrikaj gvidantoj, laboristoj kaj oficistoj de multaj kotonaj tekstilaj fabrikoj esploris, projektis kaj sukcesis konstrui moviĝantajn seĝojn por laborejo de bobonado tiel ke la laboristinoj povis manipuli la bobenadomaŝinojn sidante.

La Granda Proleta Kultura Revolucio plie stimulis la revolucion aktivecon de la tekstilistinoj. Ili proponis "havigi moviĝantajn seĝojn ankaŭ al la laboristinoj por ŝpinado de fajna fadeno kaj por teksado". Tiu iniciato tuj trovis aprobon de la fabrikaj gvidantoj. En multaj tekstilaj fabrikoj de nia lando estis starigitaj renovigaj grupoj kun laboristoj kiel la



ĉefa konsisto kaj partopreno de kadroj kaj teknikistoj por provkonstrui tiucelajn moviĝantajn seĝojn. La grupo de la Unua Koton-tekstila Fabriko de Pekino estas unu el ili.

La membroj de la renoviga grupo de tiu fabriko plejparte estas laboristinoj de koncernaj laborejoj. Por pli frue efektiviĝi la planon ili ĉiutage venis al la fabriko frue antaŭ la laborhoroj kaj forlasis la fabrikon longe post la laborhoroj. Dum vojirado kaj manĝado ili ĉiam pensis pri la afero. Kiam ili estis kune, la temo de interparolo ĉiam rilatis al moviĝantaj seĝoj. Eĉ en dormo ili sonĝis pri la afero. Tre alta estis ilia revolucia fervoro. Por projekti radojn de la seĝo, ili detale esploris kaj komparis la radojn de diversaj veturiloj. Por projekti la dorsapogilon de la



*Spinistino kontrolas sidante sur ĉareto.*

seĝo ili mezuris la malsamajn spacojn inter maŝinvicoj de la koncernaj laborejoj kaj serioze enketis pri diversakreskaj laboristinoj. Tiujn klopodojn faris ankaŭ la kadroj kaj teknikistoj. Post ripetada provo kaj plibonigo, fine la seĝoj estis sukcese konstruitaj. La laboristinoj ĝoje nomis ilin “moviĝantaj seĝoj de feliĉo”.

Nun koton-tekstilaj fabrikoj de Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj urboj aktive konstruas kaj disvastigas tiajn moviĝantajn seĝojn.

Ili havas tre diversajn modelojn. Iuj uzas relojn, unu aŭ du, kaj aliaj ne. Iuj uzas malaltensian kurenton kiel movforton kaj aliaj akumulatorojn. Al iuj estas instalitaj ankaŭ ekipaĵoj por forigi kotonfibraĵojn.

En la laborejo de fajna fadeno de la Unua Koton-tekstila Fabriko de Pekino vicoj kaj vicoj da spindeloj turniĝas altrapide. La laboristinoj laboras sidante sur moviĝantaj seĝoj sur reloj. Per tuŝeto al butono la seĝoj moviĝas antaŭen aŭ retroen aŭ haltis laŭ la volo de la sidanto, kaj rondiras laŭ la prizorgataj maŝinvicoj. La sidilo kun apogilo povas turniĝi libere ebligante al la sidanto labori super maŝinoj en ambaŭ vicoj. Sur la seĝo estas provizita ankaŭ blovaperturo de ventolilo, el kiu elblovas venteto, donante malvarmeton al la laboristino.

En la teksa laborejo de la Dua Koton-tekstila Fabriko de Pekino teksistinoj povas rapide manipuli kaj kontroli la teksaĵon produktatan sidante sur la memkonstruitaj moviĝantaj seĝoj ĉirkaŭ la teksmaŝinoj. La laboro estas multe faciligita.

La moviĝanta seĝo estas unu el la multaj renovigoj ĝenerale disvastigataj per la fonduso asignita de la ŝtato. Sur la bazo de disvolvado de produkto, paŝo post paŝo plibonigi la laborkondiĉojn kaj la bonstatigan aferon al la laboristoj kaj oficistoj estas unu el la longtempaj principoj de la nova Ĉinio.

Giang Hinghiu, laboristino de la Dua Koton-tekstila Fabriko de Pekino, kiu havas laboraĝon de preskaŭ 30 jaroj, havis agitatan koron, kiam ŝi sursidis moviĝantan seĝon. Antaŭ la Liberiĝo, la tekstilaj laboristinoj devis ŝvitlabori ĉiutage 16 horojn. Kiam iu ripozis iom ĉe la maŝino, tiu devis ricevi skurĝadon, se tion rimarkis la laborestro. Kun emocio Giang Hinghiu diris: “La kapitalistoj en la malnova Ĉinio traktis nin kiel sklavojn, tretante nin sub siaj piedoj, dum en la nova Ĉinio Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio tre zorgas kaj protektas nin.” Ŝi esprimis: “Kvankam mi aĝas preskaŭ kvindek jarojn, mi tamen devas ankoraŭ pli multe ŝpini fadenon kaj teksi bonan ŝtofon por la popolo sur tiu ‘seĝo de feliĉo’.”

# Vizito al tri cent-jaraj gemaljunuloj

“De antikveco raras homoj atingintaj 70 jarojn.” Tio estas popoldiro cirkulanta en Ĉinio. Sed en la nova Ĉinio, feliĉan vivon vivas la laborantaj popolanoj kaj pli kaj pli multiĝas grandaĝuloj. Antaŭ neloge, ni vizitis tri cent-jarajn gemaljunulojn de Sejang-gubernio de Giangsu-provinco.

Veturante okcidente de la gubernia urbo per aŭtobuso, ni venis al la unua produkta taĉmento de Lianmeng-brigado de Panvan-komunumo. Apud kelkaj verdaj plorsalikoj ĉe la bordo de rivereto troviĝas ruĝbrika domo de griztegola tegmento kun tri ĉambroj. Jen estas domo de avino Giang Ginlan.

Giang Ginlan ĉijare havas 101 jarojn. Kiam ni venis al ŝia domo, ŝi estis ion kudranta. Vidinte nin, la tre gastama maljunulino tuj demetis sian kudraĵon por bonvenigi nin. Ŝi sidigis nin, regalis nin per teo kaj diris: “Dank’ al la zorgo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, mia korpo estas tre fortika kaj miaj okuloj klaraj. Nun mi kudras novan litkovrilon por mia pranepo.”

La gepatroj de Giang Ginlan mortis, kiam ŝi estis tri-jara. Ekde la aĝo de ses jaroj ŝi komencis almozpeti por vivteni sin. Poste ŝi laboris kiel farmulo de bienulo. Ŝi multe suferis en la malnova socio dum granda parto



*La hejmo de avino  
Giang Ginlan*



de sia vivo kaj nur post la Liberigo ŝi ekvivas feliĉan vivon.

Ŝi diris al ni, ke ŝi havas tri filojn, inter kiuj la plej aĝa estas 73-jara, la dua 70-jara kaj la plej juna jam 68-jara, kaj ili ĉiuj estas sanaj. Unu el ŝiaj kvin nepoj laboras kiel estro de la kemisterka fabriko de la gubernio, alia kiel kadro en la Ĉina Popola Liberiga Armeo, tria kiel kontisto de la produkta taĉmento kaj ceteraj du kiel komunumanoj. Ŝiaj ok pranepoj ĉiuj vizitas mezlernejon kaj elementan lernejon respektive, ŝiaj familianoj disloĝas en 11 domoj kaj ĉiu vivas feliĉe kaj ĝoje.

Foje, Giang Ginlan perdis apetiton pro malsano kaj deziris manĝi fiŝan supon. Sed tiam al fiŝvendejo mankis freŝaj fiŝoj. Informiĝinte pri tio, kadro de la produkta taĉmento tuj sciigis per telefono al fiŝbredejo de la komunumo kaj la lasta tuj sendis al ŝi freŝajn karasojn. En la pasinta Lunfesto, ŝi loĝis ĉe la dua filo. Tiam ŝiaj plej aĝa kaj plej juna filoj volis inviti ŝin al sia domo por pasigi la

*Gvidantoj de la komunumo vizitas avon Liu Vankjuan.*



feston. Sed la dua filo ne konsentis. Fine, la plej aĝa kaj plej juna filoj portis al ŝi lunkukojn\* kaj aliajn frandaĵojn, kaj tiel ŝiaj tri filoj kaj ŝi kune pasigis la ĝojan feston.

En tritikkampoj de la dua produkta taĉmento de Giutan-brigado de Siming-popolkomunumo, ni renkontiĝis kun 103-jara avo Liu Vankjuan, kiu diskutas kune kun sia nepo taĉmentestro Liu Jigin kiel gajni riĉan rikolton de someraj plantoj. Tenante la manojn de la maljunulo, ni diris al li: “Kun tiel granda aĝo vi ankoraŭ zorgas pri la kolektivo. Vi devas multe prizorgi vian sanon!” Li respondis kun rideto: “Al junuloj ankoraŭ mankas sperto, mi devas ofte helpi ilin.” Liu Jigin intermetis: “En la lastaj jaroj mia avo fartis tre bone kaj malofte malsaniĝis. Antaŭ la Liberigo, li laboris kiel jardungito kaj tagdungito de bienulo kaj eksuferis astmon kaj stomakmalsanon pro malsato kaj malvarmo. Tamen dank’ al kuracado li jam resaniĝis antaŭ kelkaj jaroj.” Li do rakontis al ni, kiel nudpieda kuracisto de la brigado kuracis lin.

En vintro de 1970, kiam la avo denove suferis de stomakdoloro, Hju Hjuehua, nudpieda kuracisto de la brigado, tuj venis al li, palpulis pulson, faris akupunkturon kaj dekoktis medikamenton por li. Kvankam neĝegis kaj frostis en tiuj tagoj, tamen malgranda Hju ankoraŭ akurate venis al la maljunulo, kio tre kortuŝis la lastan. La maljunulo sincere diris al Hju: “Bona knabo, mi estas jam maljuna, kaj nemulte helpas al mi kuracado, ne zorgu min plu!” Tamen Hju Hjuehua respondis firme: “Ne tiel pensu! Mi nepre eltiros vian malsanradikon postlasitan de la malnova socio.” Por resanigi la maljunulon, malgranda Hju unuflanke kolektis drogherbajn receptojn kaj aliflanke studis novan akupunkturoterapion efikajn por kuraci la koncernan malsanon. Dank’ al zorgema kuracado de malgranda Hju, resaniĝis la maljunulo kaj la malsano ne plu okazis ĝis nun. La maljunulo ĝoje diris: “Post la granda kultura revolucio, oni starigis kooperan kuracadon, kaj kuracistoj vizitas malsanulojn en ilia hejmo. Nun mia malsano kun historio de kelkdek jaroj

jam ne plu min turmentis. Se ne en la nova socio mi ne povus vivi ĝis hodiaŭ!”

La tria de ni vizitita maljunulino estas 106-jara avino Tang. Kiam ni venis en ŝian domon, ni vidis krom la avino, ankaŭ kelkajn junulinojn. Ili estas membroj de la amatora propaganda taĉmento de la vilaĝo kaj ofte venis al ŝia hejmo por fari prezenton. La avino diris al ni: “Se ili ne venis al mi por kelkaj tagoj, mi eksopiris al ili!”

Tang Minbang, la dua filo de la avino, sciigis al ni, ke pro grandaĝeco lia patrino havas malfacilon en irado. Kiam la taĉmento projekciis filmojn, oni ĉiam unue aranĝis sidlokon

por ŝi. Ankaŭ kadroj de la gubernio kaj komunumo montris grandan zorgon al ŝi kaj ofte vizitas ŝin. Instruistoj kaj lernantoj de la elementa lernejo petis ŝin fari komparon de la nova socio kun la malnova. Kiam ŝi rakontis kiel ŝi en la malnova socio almozpetis kaj formigris aliloken por trovi vivrimedon, la lernantoj ĉiuj esprimis sian decidon: “Neforgesi klasajn suferojn kaj subpremadojn, ami la hodiaŭan feliĉan vivon kaj fariĝi revoluciaj daŭrigantoj.”

*\* Lunkuko estas ronda kuko kiun oni manĝas en la Lunfesto je la 15-a de la oka monato laŭ la ĉina luna kalendaro.*



### SUKCESA PRODUKTADO DE KOLORAJ FILMOJ LAŬ TINKTURTRANSIGA PROCEDO

Nia lando sukcesis produkti kolorajn filmojn laŭ la procedo de tinkturtransigo. Tiu procedo konsistas el faro de tri reliefaĵoj aŭ plataj matricoj el kolora negativo per kolorapartigado kaj poste tinkturo de tiuj matricoj ĉiu aparte per ruĝo, indigo kaj flavo. Fine la tri malsamkoloraj bildoj estas transigitaj sur unu senbildan filmon por ricevi pretan koloran filmon. Filmoj tiel faritaj montras bonan kolorreprodukton kaj kolorbrilon, dekoloriĝas malfacile kaj kostas malalte. Cetere tiu procedo malmulte produktas malutilajn likvaĵojn avantaĝe al protekto de medio kaj sanstato de la laboristoj.

De majo ĉijare serio da filmoj de moderna revoluciaj pekinaj operoj, sciencedu-

kaj kaj dokumentaj filmoj multobligitaj laŭ tiu procedo estas jam distribuitaj tra la tuta lando.

### ŜTRUMPOJ POR UZADO EN RIZKAMPOJ

La kamparanoj de la suda parto de nia lando devas ofte labori en akvaj kampoj, kio facile kaŭzas al ili artikiton en malvarma vetero kaj haŭtoinflamon en akvo kun alta temperaturo. Por protekti la santon de kamparanoj kaj akceli la agrikulturan produkton, la Ŝanhaja Unua Ŝtrumpofabriko kaj la Ŝanhaja Distribuista Stacio de Triakoj kune sukcesis fabrikigi ŝtrumpojn plastajn, surporteblajn en akvokampo, kiuj havas la ecojn de kontraŭfrosto, kontraŭfrotado, malpezeco, konformeco al la piedoj kaj nealteno de koto. Kun tiaj ŝtrumpoj sur la piedoj oni povas preventi artikiton, akvokampan haŭtoinflamon kaj ankaŭ infektiĝon de bilharziozo, toksigo de insekticidoj kaj esti protektata de atako de hirudoj. La prezo estas relative malalta. Ĝi bone kontentigas kamparanojn de la provincoj Giangsu kaj Ĝegiang.

# Novaj arkeologiaj trovoj

**E**KDE la Granda Proleta Kultura Revolucio, precipe ekde la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, grandan sukceson atingis nia lando en arkeologiaj laboroj. Lastatempe estis trovitaj en la sudo de Ĉinio du kulturaj postrestejoj de Ŝang-dinastio antaŭ pli ol 3,000 jaroj kaj unu lignan marŝipon de Song-dinastio antaŭ pli ol 700 jaroj. La trovo de tiuj kulturaj objektoj liveras gravan materialon en scienco por esplori la sklavan socion en suda Ĉinio kaj la rilatojn inter la antikva kulturo de la baseno de Jangzi kaj tiu de la centra ebenaĵo de Ĉinio kaj la amikajn rilatojn inter la ĉina popolo kaj la aziaj kaj afrikaj popoloj.

## URBO ANTAŬ 3,000 JAROJ


En la gubernio Huangpi en Hubej-provinco estas trovitaj bazo de palaco kaj tombo kun skeletoj de kunenterigitaj sklavoj antaŭ 3,400-3,500 jaroj de Ŝang-dinastio (ĉ. 17-a jc. — ĉ. 11-a jc. a.K.).

Same kiel la urbo de Ŝang-dinastio malkovrita en Ĝengĝoŭ, Henan-provinco, tiu nove trovita postrestejo estas unu el la plej antikvaj urboj ĝis nun trovitaj, kaj aldone kun la postrestaĵo elfosita en Vuĉeng (vidu sube), montris ke siatempe la kulturo de Ŝang-dinastio jam disvastiĝis ĝis la baseno de Jangzi-rivero.


La malkovrita bazo de la granda palaco formas ortangulon 38.2 m. longan de la oriento al la okcidento kaj 11 m. larĝan de la nordo al la sudo, dividitan en kvar ĉambrojn kun galerio ĉirkaŭe en kvar flankoj, kiu havas 43 truojn de tegmentrandaj kolonoj kaj krome truojn por malpli dikaj kolonoj. Estas videble ke la origina formo de la palaco estis sufiĉe grandioza. En tiu tempo, kvankam jam komenciĝis la uzado de bronzaĵ instrumentoj, tamen plej multe uzataj estis ankoraŭ ŝtonaj hakiloj kaj ĉiziloj. Sub tiaj kondiĉoj la konstruado de tia palaco plene manifestis la saĝon kaj kapablon de siatempa laboranta popolo.

En la menciita tombo estas konservitaj multaj valoraj objektoj. Kvankam putriĝis jam la

*Ideogramoj sur la bazo de fajenca poto*



*Ideogramoj sur la bazo de fajenca vazo*






ĉerko kaj la ekstera ĉirkaŭĉerko, tamen videblaj estas ankoraŭ la delikate skulptitaj desegnaĵoj de bestovizaĝoj kaj nuboj sur la ekstera flanko de la ĉirkaŭĉerko. Pli ol 60 bronzaĵoj, ĵadaĵoj kaj fajencaĵoj estas trovitaj, inter kiuj la plej granda bronza *dīng*-o altas je 55 cm. En la tombo troviĝas ankaŭ skeletoj de tri kunenterigitaj sklavoj. Tio estas forta kritiko al la beligado kaj restarigo de la sklav-sistemo fare de Konfucio. La lokaj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj faris revolucion kontraŭ Konfucio kaj Lin Biaŭ kune kun la vizitantaj amasoj surloke.

### KULTURA POSTRESTEJO ANTAŭ 3,000 JAROJ

En Vuĉeng de Kinggiang-gubernio, Gianghi-provinco oni trovis dum konstruado de akvo-utiligaj objektoj kulturen postrestejon de Ŝang-dinastio. La karakterizaĵoj de la tertavolo kaj la elterigitaj objektoj atestas ke ili ekzistis antaŭ 3,000 jaroj. Dum la lastaj du jaroj tie estis faritaj tri fosadoj, la areo malkovrita ampleksas pli ol 1,100 kvadratajn metrojn, kaj estis elterigitaj multaj instrumentoj por produkto kaj ĉiutaga vivo. Inter ili estas fajencaĵoj kaj muldiloj el ŝtono, kiuj surhavas skribsignojn similajn al tiuj sur antikvaj testudkirasoĵoj kaj ostoj, sed kun pli forta hieroglifeco.

*Fajenca li (antikva tripeĉa kuirpoto)*



co. Tio montras ke nia skriba sistemo trovas sian originon antaŭ 3,000 jaroj.

Elterigitaj estas multaj fragmentoj de ujoj kaj vazoj faritaj el kaolino kaj glazurita ekstere. Kemia analizo pruvis ke la produktotekniko de tiuj objektoj jam atingis la nivelon de primitiva porcelano. Aliaj elfositaj ŝtonaj muldiloj por fari bronzaĵojn, bronza skorio kaj bronzaĵoj montras ke la metalurgia tekniko de bronzoproduktado atingis sufiĉe altan nivelon.

La formo kaj ornama desegnaĵo de la grandnombraj elfosaĵoj similas al tiuj de la samtempaj historiaj restaĵoj elfositaj en nordaj provincoj. Tio montras intimajn rilatojn inter la siatempa kulturo en la regiono sude de Jangzi kaj tiu de la centra ebenaĵo.


La elfosaĵo de tiu kultura postrestejo havas gravan sciencan valoron por studi la sklavan socion de niaj sudaj areoj kaj la rilatojn inter la kulturoj de tiuj areoj kaj de la centra ebenaĵo.



### MARŜIPO ANTAŭ 700 JAROJ

Arkeologiaj laborantoj de Fugian-provinco elfosis marŝipon faritan el ligno antaŭ 700 jaroj en Kĵuanĝoŭ-golfo. En la ŝipo estas trovita nombro da valoraj kulturaj objektoj.

Tiu ŝipo estas elfosita el mar-koto pli ol du metrojn profunda sub la surfaco. Granda

*Fajenca doŭ (antikva altpieĉa telero)*





*Bronza adzo kaj ĝia muldilo el ŝtono*

parto de ĝia korpo estas relative bone konservita kun postresta longo de 24.2 metroj kaj larĝo de 9.15 metroj. La lignaj tabuloj de la ŝipo estis strukturitaj el du aŭ tri tavoloj kunigitaj unu super alia. Estas kune 13 holdoj kun kapacito de ĉirkaŭ 200 toneloj.

La trovaĵo interne de la ŝipo pliparte estas kulturaj objektoj, aromaĵoj kaj medicinaĵoj

determineblaj kiel ĝia kargo. Inter tiuj objektoj estas distingeblaj multaj aromaj lignoj, pipro, areknuksoj, olibano, ambro, cinabro, hidrargo kaj ĥeloniŝeloj. Estas trovitaj ankaŭ 524 moneroj el latuno kaj fero, plejparte de Song-dinastio (960-1279) kaj parte de Tang-dinastio (618-907), krome ankaŭ aliaj iloj, objektoj, ostoj de manĝitaj animaloj kaj fruktokernoj.



*Arkeologoj mezuras la antikvan marŝipon.*

Post studo arkeologiaj laborantoj konstatis, ke ĝi estis varŝipo por oceana navigado konstruita en Fugian en Song-dinastio. Kjuanĝou havis komunikadon kun fremdaj landoj jam en la sesa jarcento laŭ historia registro. Poste ĉirkaŭ la deka jarcento kaj dum la dekkvara

jarcento ĝiaj komercaj rilatoj kun aziaj landoj fariĝis ankoraŭ pli prosperaj. Tiu elfosita marŝipo provizas historian ateston pri la amikaj rilatoj de nia popolo kun aziaj kaj afrikaj popoloj.



### SUKCESOJ EN BATALO KONTRAŬ HAJLO EN ANATAŬURBO DE PEKINO

La komunumanoj en la antaŭurbo de Pekino kaj sciencaj esplorantoj aktive disvolvis en la lastaj jaroj sciencan esploradon pri prevento de hajlo kaj akiris unuajn sukcesojn.

Hajlo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de naturaj katastrofoj en Pekino. Laŭ statistikoj, hajlas meznombro 18 fojojn kaj maksimume 32 fojojn en ĉiu jaro en la antaŭurbaj montregionoj de Pekino kaj iliaj ĉirkaŭaĵoj. Tio damaĝas la agrikulturan produktadon. En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio komunumanoj kaj sciencaj esplorantoj kritikis la reakcian fatalismon kaj decidis venki naturan katastrofon. Ili memstare faris fajrajobusojn, kiuj povas eksplodi en alteco de 500 metroj kaj plastajn raketojn kun paf-distanco de 3,000 metroj. Esplorante hajlajn regionojn kaj studante metean materialon ili ekkonis la leĝon de formiĝo kaj moviĝo de hajlo en la regiono de Pekino, altigis la ĝustecon de veterprognozo kaj ankaŭ donis sciencan teorion bazon por racie lokigi hajlopreventajn staciojn.

Nun naŭ gubernioj, 50 komunumoj en antaŭurbo de Pekino starigis 294 staciojn

por preventi hajlon kaj per tio multe malgrandigis la damaĝon de hajlo.

### ORIENTITA EKSPLODIGO DE MONTETOJ POR FORMI KAMPOJN EN HIJANG-GUBERNIO

Hijang-gubernio de Ŝanhi-provinco jam vaste aplikis la teknikon de orientita eksplodigo de montetoj por formi kampojn. Ekde la lasta vintro oni jam formis el montetoj pli ol 50 ebenejojn ĉiujn kun amplekso de kelkdek ĝis cent muoj (1 muo=1/15 hektaro).

La nomita tekniko estis unue sukcese aplikita en Daĝaj-brigado. Tio forte kuraĝigis la kadrojn kaj komunumanojn de multaj komunumoj kaj brigadoj de la gubernio. Troviĝis naŭ montetoj en Lifuju-brigado, sed pro manko de laborfortoj oni ne kuraĝis tuŝi ilin antaŭe. En la lasta aŭtuno ili ebenigis tiujn montetojn per orientita eksplodigo kaj formis ĉiprintempe ebenajn kampojn de 80 muoj, kaj sur ili oni jam kreskigas grenplantojn. Ankaŭ Nannaŭ-brigado tiamaniere faris el monteto ebenan kampon de ĉirkaŭ 100 muoj.

Sub la helpo de teknikistoj de la Pekina Dinamika Instituto Hijang-gubernio starigis kursojn pri orientita eksplodigo por kulturaj teknikistoj. Ĉiu komunumo kaj produkta brigado jam starigis por si specialan grupon por fari orientitan eksplodigon kaj multaj komunumanoj jam scipovas aplikati tiun teknikon.





# Golaŭ-oj

de ZONG MIN

**G**OLAŬ-NACIECO kun pli ol 24,000 membroj estas unu el la nacimalplimulto en la sudokcidenta parto de Ĉinio, kiu havas longan historion. Ili dise loĝas kune kun aliaj nacioj en Zunji, Pingba, Ginŝa k.a. sume pli ol 20 gubernioj okcidente en Gujĝoŭ kaj en la Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio de la Guanghi-a Ĝuang-a Aŭtonoma Regiono.

La golaŭ-a lingvo apartenas al la han-tibeta lingvofamilio. Ĝiaj dialektoj multe diferencas unu de alia pro disa loĝado. La golaŭ-a kaj han-a lingvoj estas plej intime parencaj, ĉiuj golaŭ-oj ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu maljunuloj aŭ junuloj, scipovas paroli la han-an lingvon. Ne havante sian skriban lingvon ili ĝenerale uzas han-lingvon en skribado.

Golaŭ-oj devenis de la antikvaj liaŭ-oj. Antaŭ pli ol mil jaroj, la praavoj de golaŭ-oj jam loĝis en Gujĝoŭ k.a. kaj okupiĝis pri agrikulturo. Antaŭ la Liberiĝo, la golaŭ-oj ankoraŭ konservis multajn karakterizaĵojn de la antikvaj liaŭ-oj en loĝado, vestado, manĝado, funebra ceremonio k.a. kutimoj kaj moroj. Ekz., la jupo de malmultaj golaŭ-aj virinoj tre similas al la sitelforma jupo de la antikvaj liaŭ-oj.

De la 5-a ĝis la 10-a jarcento relative progresis la socia produkta forto en la golaŭ-aj regionoj. Tiam liaŭ-oj jam povis fari metalajn fiŝpikilojn, lancojn, ŝildojn k.a. batalilojn kaj ankaŭ malpezan kaj maldikan kupran kaldranon kun granda ventro. En la lastaj jaroj de la 5-a jarcento, praavoj de golaŭ-oj starigis ĉe la piedo de Mengŝan-monto (sudokcidente de la nuna Gonghian-gubernio de Siĉuan) fornegon tri metrojn altan kaj kvin metrojn larĝan por fandi kupron el kuprominaĵo grandkvante troviĝanta ĉeloke. Kaj ili tiam jam

povis teksu ŝtofon delikatan kaj bonkvalitan el lino kiu servis kiel tributo al feŭdaj regantoj, kaj ili povis fari ankaŭ delikatajn drinkujojn bird- kaj best-formajn el arĝento. Krome, ili ekspluatis hidrargan minon por rafini cinabron per simpla metodo. Longan historion havas iliaj metioj, inter kiuj la feraĵa metio estis la plej fame konata kaj pro tio en Kingdinastio oni donis al ili la nomon “golaŭ-oferajistoj”. Sed en la malnova socio, ilia metia produktado troviĝis en stagneco kaj malvileco.

Post la 7-a jarcento, ilia agrikultura produktado jam sufiĉe disvolviĝis, rizo, tritiko k.a. grenoj jam aperis kiel varoj sur merkatoj kaj la interŝanĝo de varoj pli kaj pli multiĝis. En la sesdekaj jaroj de la 11-a jarcento, la feŭdaj fortoj en golaŭ-aj regionoj jam estis tre potencaj. Ekz., troviĝis tiam tri golaŭ-aj terposedantaj mastroj, kiuj respektive posedis grandan kvanton da fekundaj kampoj kun miloj da familioj de dependaj kamparanoj. Ili konstruis citadelojn kaj organizis armajn fortojn por firmigi sian regadon. Dum la pasinta longa periodo, sub la kruela subpremo kaj ekspluato de ĉiuj reakciaj regantaj klasoj, la agrikultura produktado de golaŭ-oj ne povis progresi kaj la popolo sin trovis en mizero.

En la historio, la golaŭ-oj kaj aliaj nacioj starigis inter si intimajn rilatojn en komuna laborado, interhelpado kaj reciproka lernado. En la batalo por defendi la patrolandon kaj rezisti kontraŭ agresado, ankaŭ la golaŭ-aj popolanoj kontribuis sian forton. En la mezo de la 16-a jarcento, kune kun tu-aj, miaŭ-aj kaj han-aj popolanoj ili heroe rebatis la entrudiĝon de la japanaj piratoj en la apudmaraj regionoj.

En 1935, la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio trapasis dum sia Longa Marŝo Kianhi, Dading, Zunji, Ĵenhuaj k.a. guberniojn de Gujĝoŭ, kaj ricevis grandan helpon de golaŭ-oj. Ili ĉiamaniere ŝirmis ĝiajn vunditojn kaj mal-sanulojn, iuj junuloj eĉ aliĝis al la revolucia trupo kaj faris kontribuojn por la afero de popola liberigo.

Antaŭvespere de la Liberiĝo, inter la golaŭ-oj cirkulis revolucia kanto pri la Ruĝa Armeo:

*La bienulaj gretenejoj ja plenplenas —  
ĉe l' malriĉuloj eĉ ne estas gren' por kaĉo.  
Lokaj tiranoj loĝas en modernaj domoj,  
sed laboristoj, kampanoj en kabanoj.  
La sang' de l' lastaj estas tute elĉerpita  
pro la sennombraj impost-raboj tre kruelaj.  
Subtenu ni l' Armeon Ruĝan en batalo,  
ke l' laboruloj baldaŭ iĝu jam liberaj.*

En 1949 liberiĝis la provinco Gujĝoŭ. De tiam la golaŭ-oj malfermis novan paĝon de historio kaj prosperiĝis iom post iom.

De la pasinta longa tempo, golaŭ-oj sin okupis ĉefe pri agrikulturo, kies produktaĵoj inkluzivas maizon, rizon, sojon, tritikon kaj sorgon. Antaŭ la Liberiĝo, plejparto de ilia agro estis okupata de bienuloj, burokratoj, komercistoj kaj imperiismaj misiistoj. La produktkvanto de greno estis tre malalta, kaj tiu de rizo atingis nur 50-100 kg. pomue. Tre mizeraj estis la golaŭ-aj kampanoj, iuj el ili eĉ ne povis sin satigi per brano kaj legomoj kaj devis sin vesti per ŝelo de palmo. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj post la agrara reformo, kooperigo de agrikultura produkto kaj popolkomunumigo, la produktkvanto de greno en la golaŭ-aj regionoj kreskis senĉese. Precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio, pli rapide disvolviĝis la agrikultura produkto. Ni prenu Pingĝen-komunumon de Zunji-gubernio kiel ekzemplon. De 1968, ĝiaj golaŭ-aj kampanoj kreis sume pli ol 1,000 muojn da agro kaj konstruis 21 akvorezervujojn grandajn kaj malgrandajn. La pomua produktkvanto de rizo en tiu komunumo kreskis de 50-100 kg. antaŭ la Liberiĝo ĝis pli ol 400 kg. Nun, la kolektiva rezer-



*Komunuma gvidanto Tian Hingcaj (golaŭ-o, la dua de maldekstre) kaj komunumanoj pririgardas rizplantojn.*

vita greno de la komunumo atingis preskaŭ 160,000 kg. kaj ankaŭ ĉiuj familioj de komunumanoj konservas certan kvanton da greno.

Ankaŭ industrio kaj metiado de golaŭ-oj multe disvolviĝis. Sub la gvido kaj intima zorgo de la Partio, golaŭ-aj metiistoj sin organizis en metiajn produktajn kooperativojn, kiuj poste disvolviĝis en fabrikojn de agrikulturiloj, riparejojn de traktoroj kaj elektrejojn de gubernioj, komunumoj kaj brigadoj.

Sur la bazo de produkta disvolviĝo, ankaŭ kultura, eduka, medicina kaj higiena aferoj havis rapidegan progreson. Antaŭ la Liberiĝo, 98 procentoj de la golaŭ-oj en Anliang de Ĵenhuaj-gubernio estis analfabetoj kaj en iuj lokoj eĉ ĉiuj estis analfabetoj. Post la Liberiĝo, la Partio kaj la popola registaro donis apartan zorgon al ilia kultura kaj eduka aferoj, ĉiujare disponigis specialan sumon al ili por konstrui

lernejajn domojn, aldoni necesajn instalaĵojn kaj senpage akcepti golaŭ-ajn lernantojn kaj krome donis al ili popolan stipendion. Dank' al tio rapide disvolviĝis la kultura kaj eduka aferoj. Rilate al medicino kaj higieno, la gubernioj, komunumoj kaj brigadoj jam starigis seŝion da kuracaj organizaĵoj, kaj nudpedaj ku-

racistoj aktive servas al la popolo vizitante malsanulojn en iliaj domoj.

Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, nun la golaŭ-oj venke faras socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon kaj batalas por firmigi la diktaturon de la proletaro.



### TRI MONDAJ REKORDOJ ROMPITAJ EN LA ĈINA TUTLANDA ARKOPAFa KONKURSO

La tutlanda arkopafa konkurso de nia lando okazis en la urbo Sanming de Fugian-provinco de la 27-a ĝis la 30-a de aprilo, 1975. Song Ŝuhian, 21-jara sportistino de la Pekina Fizikokultura Instituto atingis bonajn sukcesojn, sinsekve rompinte tri mondajn rekordojn kaj egalinte du mondajn rekordojn. La 28-an de aprilo per 1255 cirkloj ŝi rompis la mondan rekordon de 1237 cirkloj kreitan de la ĉina sportistino Huang Ŝujan en la kunmetita individua solronda arkopafa konkurso en 1974 kaj egalis la mondan rekordon de la virina 70-metra solronda arkopafado; la 29-an per 593 cirkloj ŝi renovigis sian mondan rekordon de 585 cirkloj en la virina 70-metra duronda arkopafa konkurso kaj egalis al la monda rekordo de la virina 60-metra duronda arkopafa konkurso per 631 cirkloj; la 30-an per 2450 cirkloj ŝi rompis la mondan rekordon de 2443 cirkloj en virina kunmetita individua duronda arkopafa konkurso.





La ĉifoja arkopafa konkurso estis la plej grandskala ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio. 110 partoprenantoj de la konkurso venis el 11 provincoj kaj urbegoj. Ili estas gesportistoj el tibeta,

mongola, huj-a, sala-a, dahura kaj hana naciecoj, el kiuj pli ol 90% estas gejunuloj kaj geknaboj.

### GRANDNOMBRE ELDONITAJ FIZIKOKULTURAJ LIBROJ

Por kontentigi la bezonojn de rapida disvolviĝo de la amasaj sportaj aktivadoj, la Popola Fizikokultura Eldonejo eldonis en la lastaj jaroj fizikokulturajn librojn kun cent titoloj kiuj montriĝis tre bonvenaj al la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Inter la eldonaĵoj estas libroj kun enhavo de politika kaj ideologia propagando, kiel *Firme Memoru la Fundamentan Linion de la Partio*, *Fortigi la Korpon por la Revolucio*, *Nova Fizionomio de la Amasa Fizika Kulturo* kaj aliaj; en la libroserio pri metodoj de fizika kulturo estas popularaj broŝuroj pri tablotenis, longdistanca kurado, haltero, sanprotekta masaĝo kaj aliaj; rilate al mezgradaj teknikoj eldoniĝis *Korbopilado*, *Altsaltado*, *Rapida Glitkurado* kaj aliaj; estas ankaŭ libroj prezentantaj la tradicion luktarton de nia lando kiel la reviziitaj kaj reeldonitaj *Simpligita Tajĝiĉjuan*, *Elementa Ĉangĉjuan*, *Elementa Spadarto* kaj aliaj; rilate al ŝakoj estas reviziitaj kaj reeldonitaj *Ĉina Ŝako* (3 volumoj) kaj *Registro de Elektitaj Partioj de Amikeca Vejĉi-konkursoj inter Ĉinaj kaj Japanaj Ludantoj* (4 volumoj). Krome oni eldonis librojn pri la regularoj de diversaj sportbranĉoj, spertoj en fizikokultura laboro kaj fiziologia higieno de fizika kulturo, kaj propagandajn afiŝojn kaj novjarajn bildojn kaj belartaĵojn pri fizika kulturo.





Sur la kovrilo:

Pafistoj interŝanĝas sperton

# EL POPOLA ĈINIO 中國新道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj  
Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

---

N-ro 8 (205) 1975

---

## Ĉefa Enhavo

Li kondukas ankoraŭ kiel ordinara soldato . . . . .	1
ĈPLA-anoj amas la popolon . . . . .	4
Kuna defendo de landlimo ( <i>poemo</i> ) . . . . .	8
Ĉangĝou-a industrio en rapida disvolviĝo . . . . .	10
Novaj "Malsaĝaj Avoj" en Tajhang . . . . .	15
Sur la Siĉuan-Tibeta Ŝoseo . . . . .	19
Ĉinaj montgrimpistoj refoje konkeris Ĝomolangma-n . . . . .	23
Vizito de Vicĉefministro Deng Hiaŭping al Francio . . . . .	29
Navigado al la for' ( <i>kanto</i> ) . . . . .	37
Li konservas la naturon de ordinara laborulo . . . . .	40
Moviĝanta seĝo por tekstilaj laboristinoj . . . . .	43
Vizito al tri cent-jaraj maljunuloj . . . . .	45
Novaj arkeologiaj trovoj . . . . .	48
Golaŭ-oj . . . . .	52



# Nova fizionomio de antikva kanalo


Kin-kanalo estas antikva irigacia kanalo en la Ninghia-a Huja Aŭtonoma Regiono en nordokcidenta Ĉinio. Ĝi estis konstruita de Kin-dinastio antaŭ pli ol 2,100 jaroj por akvumi kampojn per akvo de la Flava Rivero. Tiu 75 kilometrojn longa kanalo ludis siatempe gravan rolon en disvolvo de la agrokultura produktado. Antaŭ la Liberiĝo, la kanalo estis ŝtopita de leŭsosedimento pro manko de drago dum longa tempo kaj formiĝis en ĝia baseno multaj lagetoj kaj marĉoj, tiel ke pli kaj pli malgrandiĝis la areo de la agroj sur ĝiaj ambaŭ bordoj.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio la tieaj hujaj kaj hanaj popolanoj refunkciigis la kanalon, plibonigis ĝian irigacian sistemon, konstruis novajn digojn, kluzojn kaj branĉojn kaj ŝanĝis per tio la lagetojn kaj marĉojn en fekundajn kampojn. Nun la irigaciata areo de tiu antikva kanalo duobliĝis kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo.

Nova aspekto de Kin-kanalo









Plia riĉa rikolto akirita de popola komunumo sur bordo de la kanalo





Riĉa rikolto antaŭvidebla en la irigaciata areo de la kanalo



Hortikultura eksperimentejo apud dezerto jam fariĝis bazo de fruktoproduktado



# Mangŝi — nova urbo

## en landlima regiono

La urbo Mangŝi situas en la sudokcidenta landlima regiono de Ĉinio. Ĝi estas la ĉefurbo de la Dehong-a Daja kaj Ĝingpoa Aŭtonoma Subprovinco de Junnan-provinco. En la pasintaj pli ol 20 jaroj post la fondiĝo de la aŭtonoma subprovinco, rapide disvolviĝis la konstruado de tiu urbo kaj nun ĝi estas la politika, ekonomia kaj kultura centro de la aŭtonoma subprovinco.


Antaŭe Mangŝi havis nenian industrion, sed nun ĝi jam posedas dekojn da fabrikoj kaj minejoj produktantaj maŝinojn, hejtajon, elektron kaj kemiaĵojn. Vigle disvolviĝas ankaŭ ĝiaj trafiko, komerco, eduko kaj kultura kaj higiena aferoj. Ankaŭ la viv-nivelo de ĝiaj diversnaciecaj popolanoj altiĝas tagon post tago. Jam radikale ŝanĝiĝis ĝia malriĉa kaj postigiĝinta fizionomio antaŭ la Liberiĝo.

Membroj de popola komunumo de la antaŭurbo





En Magazeno




La sidejo de la registaro  
de la aŭtonoma subpro-  
vinco

Studentoj de la medicina lernejo de la aŭtonoma subprovinco faras eksperimenton per besto sub direktado de sia instruistino.







Discoj produktitaj de la fabriko de agrokulturaj masinoj

Kontrolejo de la Manĝaĵfabriko de Mangŝi







## La marĉoza regiono hodiaŭ

La marĉoza regiono, kiun la Ruĝa Armeo trapasis malfacile en sia Longa Marŝo, nun jam fariĝis riĉa paŝtejo.

En printempo, sur la regiono pompas floroj en sunbrilo, bovaroj kaj ŝafaroj de popolaj komunumoj vagas sur paŝtejoj kun nutrozaj herboj kaj paŝtantaj tibetanoj laŭte kantas sur galopantaj ĉevaloj.

Antaŭ la Liberiĝo, tiu marĉoza regiono estis tre malfacile trapasebla, ĝiaj produktado kaj kulturo estis ege postigintaj kaj la tie loĝantaj tibetanoj vivis sklave sub la kruelaj subpremado kaj ekspluatado de la reaktia reganta klaso. Nun sub la gvido de la Komunista Partio, la liberigitaj paŝtistoj konstruis, per siaj diligentaj manoj, ŝoseojn, fabrikojn, butikojn, lernejojn kaj hospitalojn sur la stepo antaŭe maldense loĝata. Ankaŭ la brutobredado de tiu regiono multe disvolviĝis. La totala nombro de la tieaj brutoj estas pli ol trioblo de tiu antaŭ la fondiĝo de popolaj komunumoj kaj granda kvanto da viando kaj aliaj brutoproduktoj estas liverata al la ŝtato en ĉiu jaro. Sekve de la disvolviĝo de la produktado, multe boniĝis ankaŭ la vivo de la paŝtistoj tie loĝantaj.

Nova aspekto de stepo



Nova stepa vilaĝo

Liberigita paŝtisto Lanka  
(la 1-a de maldekstre) fa-  
riĝis sekretario de guber-  
nia komitato de KPC.



La familio de liberigita paŝtisto Kede

*Sur la dorskovrilo:*  
Printempa plugado sur paŝtejo

Butikistoj vendas  
varojn sur paŝtejo.





